

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361


7

1993

中國報道

EL POPOLA

ĈINIO





Koloraj fontanoj

Foto de **LI CHUNGENG**

## INTER NI

Por mi estas tre interesa temo — Hongkongo. Mi aŭdis, ke en 1997 ĝi denove fariĝos teritorio de la Ĉina Popola Respubliko. Ĉu ekzistas problemoj tiurilate kaj kiel ilin solvi oni volas? Estus interese tralegi artikolon pri la nuna vivo de la regiono.

Mi supozas, ke multaj homoj volus doni sanon al siaj infanoj, sed ili ne ĉiam scias kiel fari. Sano de sekvaj generacioj estas nia estonteco. Mi estas certa, ke en Ĉinio oni havas bonegan sperton, ĉu ne? Do kial ne fondi rubrikon en via revuo — “Por Gepatroj”? Tie vi povus publikigi diversajn popolrime-dojn, konsilojn de plej famaj ĉinaj infan-kuracistoj kaj saĝuloj. Sendube, ĝi estus bonega rubriko interesa por viaj multaj legantoj.

**ANDREJ SOKOLOV**  
(Rusio)

Mi petegas vin aperigi pli da artikoloj pri ekonomiaj kaj financaj temoj. Se eble, ankaŭ pri ekonomiaj ŝanĝigoj en najbaraj landoj.

Kiel aliaj legantoj, ankaŭ mi petas, ke vi laŭeble prezentu la “malrozcoloran” flankon de la ĉina nuntempa vivo.

**HENRIQUE ANSELMO  
SILVA BRAGA**  
(Brazilo)

Al la revuo mankas artikoloj pri agado de Esperantaj kluboj. Estas bezonata aparta rubriko por E-kluboj.

EPĈ povus organizi konkursojn por legantoj. La premio por gajnintoj povus esti abono de EPĈ. Eble iuj legantoj povus aboni la gazeton EPĈ por nepagipovaj kluboj?

**ROMUALDAS KAZLAUSKAS**  
(Litovio)

La “Sinteza utiligo de metano

en Ĉinio” estas bonega reklamo. Tial tre necesus, ke oni pli detale priskribu tion. La plej valora mi konsideras la artikolon de Kees Ruig “Ĉu la internacia komerco bezonas Esperanton?”. Estus bone, se similaj artikoloj aperos pli ofte.

**DENISOV VLADIMIR**  
(Rusio)

Mi ŝatus legi iom pri la ebleco de la laboristoj partopreni en la politikaj decidoj kaj ŝatus scii, kiel la popolo povas kontribui al la decidoj, kiuj interesas la popolon.

**PIERI UMBERTO**  
(Italio)

*La konsiloj de niaj legantoj multe helpas riĉigi nian revuon. Ni serioze atentus pri ili kaj aperigos rilatajn artikolojn en la revuo. Dankon pro ilia kunlaboro!*

**La Red.**



## ENHAVO

- 4 Nova epoko de Ĉinio  
 6 **La nuna stato de la ĉina fervojo**  
 33 **VERDIGO EN ĈINIO:**  
 Granda verda muro en norda Ĉinio  
 8 **HISTORIA MISTERO:**  
 Kiujn landojn vizitis la ĉina navigisto Zheng He?  
 40 **Ĉinaj ideogramoj kaj komputoro**  
 38 Bona komenco de la kampara infana eduko  
 10 Strebo de esperantisto  
 48 Neordinara boks-konkurso  
 18 **PEKINO KAJ OLIMPIKOJ EN 2000:**  
 Diversstilaj konkursejoj  
 50 Novaj fruktoj por homa sano  
 15 **POR VIA SANO:**  
 Saniga ĉigong-terapio (II)  
 24 **Moderna ĉina dancarto**  
 31 **METIARTAĴOJ:**  
 Koloraj modlaĵoj de Fengxiang  
 28 **EL ĈINAJ GAZETOJ**  
 29 En la granda antikva loĝejo de la familio Qiao


- 21 **SUR STRATOJ:**  
 Al diverseco de laŭsezonaĵ vestoj  
 37 **ITINERO PROPONITA:**  
 Septaga itinero Pekino — Xi'an — Ŝanhajo — Suzhou  
 44 Por la scienc-teknika progreso de la disvolviĝantaj landoj  
 45 Akupunkturado al poloj  
 13 **AMUZOJ**  
 46 **KURANTAJ AFEROJ**  
 12 Rava, denaska esperantistino  
 14 **ALILANDANOJ EN ĈINIO**  
 17 **POR KOMENCANTOJ:**  
 Saĝa "trompisto"  
 16 **ESP-NOVAĴOJ**  
 2 **INTER NI**  
**SUR LA KOVRILO:**  
 Prof. Dai Liming.

Foto de Liu Sigong

- 2 Koloraj fontanoj  
 42 Alilandaj studentoj en Ĉinio  
 26 Dancoj de naciminoritatoj  
 49 Surglacia konkurso  
**SUR LA DORSKOVRILO:**  
 La pitoreskejo Longqingxia en Pekino

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Binxian-gubernio (p. 33)  
 2. Uzbel-monto (p. 33)  
 3. Qingxian-gubernio (p. 38)  
 4. Qixian-gubernio (p. 29)



# Nova epoko de Ĉinio

**M**ARTE de 1993, en Pekino okazis la Unua Sesio de la Oka Tutlanda Popola Kongreso kaj la Unua Sesio de la Oka Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco (ĈPPIK). La reprezentantoj de diversaj nacioj kaj lokoj de Ĉinio kolektiĝis en Pekino kaj diskutis pri ŝtataj aferoj.

Pli ol duono de la 2 093 membroj de la konferenco estis nove elektita; kaj nur 28.5% de la 2 977 reprezentantoj de la popola kongreso estis partoprenantoj de la Sepa Tutlanda Popola Kongreso. La reprezentantoj de la du kunvenoj estis pli junaj, pli alte klerigitaj kaj pli aktivaj en ŝtataj aferoj, ol tiuj de la antaŭaj samspecaj kunvenoj. Ĉi-foje la naci-malplimultaj reprezentantoj de la popola kongreso pliiĝis je kelkaj kaj ĉiu el la 56 nacioj de Ĉinio havis sian reprezentanton.

Profundigi la reformadon kaj rapidigi la ekonomian konstruadon estis la ĉefa temo de ambaŭ kunvenoj. La popolaj reprezentantoj aprobis la Raporton pri la Laboro de la Registaro faritan de ĉefministro Li Peng de la Ŝtata Konsilantaro kaj sankciis la Rezolucion pri la Nacia Ekonomio kaj Socia Disvolviĝo de 1992 kaj la Plano de 1993 kaj la Rezolucion pri Plenumo de la Ŝtata Buĝeto de

1992 kaj la Ŝtata Buĝeto de 1993.

Ĉefministro Li Peng raportis pri la sukcesoj akiritaj de Ĉinio en la reformado kaj pordomalfermo kaj la ekonomia konstruado en la lastaj kvin jaroj. Li montris, ke nun la ĉina kampara ekonomio disvolviĝas ĉiuflanke, trapasinte la malfacilan periodon, kaj Ĉinio havis riĉan rikolton de greno en la kvar sinsekvaj jaroj. La prosperantaj vilaĝaj entreprenoj, kies produktovaloro konsistigas trionon de la totala industria produktovaloro de la lando, estas grava forto de la nacia ekonomio de Ĉinio. La reformado kaj pordomalfermo de Ĉinio disvolviĝas pluen. Plivigliĝas la specialaj ekonomiaj regionoj, scienc-teknikaj ekspluatataj distriktoj, malfermitaj ĉemaraj urboj kaj regionoj. Kaj aperis nova aspekto en ĉiuj flankoj de malfermitaj urboj ĉe la maro, Yangzi-rivero kaj landlimoj kaj la ĉefurboj de landinternaj provincoj.

Menciante la taskon de la venontaj kvin jaroj, li diris, ke la Ŝtata Konsilantaro faris necesajn reguligojn al la ĉefaj normoj de la ekonomia kaj socia disvolviĝo de la Oka Kvinjara Plano (1991-1995). Ĝi estas preta elabori la Naŭan Kvinjaran Planon (1996-2000) kaj difini celojn por la disvolviĝo antaŭ 2010. Laŭ la reguligita Oka Kvinjara Plano, la





jara averaĝa rapideco de la nacia ekonomio kreskos de 6% al 8-9%. Se la tasko finplenumiĝos, la ĉina nacia ekonomio iros al nova etapo.

En la kunvenoj estis aprobitaj la amendoj de la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko. En ĝi estas difinite, ke la starigo de la sistemo de la socialisma merkata ekonomio estas la celo de la reformado de la ŝtata ekonomia sistemo. Tio havas profundan signifon por garantii la disvolviĝon de socialismo kun ĉinaj karakterizaĵoj. En la kunvenoj estis aprobitaj an-

kaŭ la Baza Leĝo de la Speciala Administra Regiono Aŭmen de la Ĉina Popola Respubliko kaj la decido, ke la Oka Tutlanda Popola Kongreso rajtigu sian konstantan komitaton starigi la preparan labororganon por la prepara komitato de la Speciala Administra Regiono Hongkong por garantii la glatan transiron de la Hongkong-a regpotenco en 1997 kaj la restarigon de la suvereneco de la ĉina registaro super Hongkong.

En la popola kongreso Jiang Zemin (Ĝjang Zemin) estis elektita kiel prezidanto de la Ĉina Po-

pola Respubliko kaj prezidanto de ĝia Centra Milita Komisiono, Qiao Shi (Ĉjaŭ Ŝi) kiel prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio. Laŭ la propono de Jiang Zemin, Li Peng estis nomumita ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio. En la Unua Sesio de ĈPPIK Li Ruihuan (Li Ĵujhuan) estis elektita kiel ĝia prezidanto. La nove elektitaj gvidantoj de Ĉinio estas energioplennaj kaj spertaj. Gvidate de ili, la ĉina popolo pli firme unuiĝos kaj marŝos al nova epoko de la moderna konstruado. ■

Popolaj reprezentantoj en balotado



ZHANG WEN:

# La nuna stato de

**E**N la lastaj jaroj la senĉese kreskanta nombro de pasaĝeroj kaj montoj da varoj multe embarasis la ĉinan fervojon, kiu restis malmoderna dum longa tempo. Trajnoj ĉiam estis plenplenaj kaj staciaj tenejoj plenplenaj de transportotaj varoj. Ekonomikistoj opinias, ke en Ĉinio la fervojo estas sama kiel kolo de botelo, kiu katenas disvolviĝon de la ĉina ekonomio. Oni volas scii, kiam plilarĝiĝos la kolo.

## ĜENERALA STATO DE LA FERVOJO EN ĈINIO

Jam antaŭ pli ol 100 jaroj en Ĉinio oni komencis konstrui fervojon. La granda antaŭiranto de la

Fervojo konstruata

ĉina demokratia revolucio d-ro Sun Yatsen deziris havi en Ĉinio 160 000 km da fervojo, sed fakte en la fino de 1992 la totala longo de la ĉinaj fervojoj estis nur 54 000 km, el kiuj 40 000 km estas unutrakaj. Nun en ĉiu dekmilo da kvadrataj kilometroj da tero meznombre funkcias nur 56.1 km da fervojoj; per tio Ĉinio okupas la 70-an lokon en la mondo. Se oni kalkulas pokapan posedon de fervojo, do ĉiu usonano havas 0.83 m, ĉiu hindo 0.08 m kaj ĉiu ĉino nur 0.045 m da fervojo; per tio Ĉinio staras post la 100-a loko en la mondo.

Efektive, en Ĉinio la fervojoj estas plej peze ŝarĝitaj. Nun la lando bezonas 120 000 vagonojn ĉiu-

tage, sed oni akiras ĉiutage nur 73 000 vagonojn. Koncerne la pasaĝerajn trajnojn de Ĉinio, laŭ la povo ili ĉiutage povas transporti 2 milionojn da pasaĝeroj, sed fakte ili transportas ĉiutage pli ol 3 milionojn. En la 40 tagoj antaŭ kaj post la Printempa Festo en januaro, 1993, en Ĉinio 118 milionoj da pasaĝeroj veturis per trajnoj. Multaj eksterlandanoj miris pri tio, ĉar la tuta loĝantaro de multaj landoj estas malpli granda ol tiu nombro.

Limigite de la transporta kapablo de la fervojoj, multaj produktaĵoj ege gravaj por la nacia ekonomio devas esti fabrikitaj laŭ la limigita transporta kapablo. La bonkvalita karbo en Shanxi (Ŝanŝji)-provinco kaj aliaj lokoj, stokita sub la ĉielo, bruliĝas, dum la sudorientaj ĉemaraj regionoj devigite limigas aŭ tute ĉesigas sian produktadon pro manko de karbo kaj elektro. Ĝuste pro tio oni opinias, ke solvo de energia problemo en Ĉinio dependas ĉefe de transporta kapablo. Koncernaj departementoj kalkulis, ke en la lastaj du jaroj la ŝtato ĉiujare perdis 400 miliardojn da juanoj pro manko de energio.

La similaj problemoj aperis ankaŭ en transporto de fosfora erco en la Sudokcidento de Ĉinio kaj kotono, sukero, salo kaj oleo en la Nordokcidento. La plej kompatindaj estas la mandarinokultivistoj en Guangxi (Gŭangŝji). Ili abunde rikoltis mandarinon, tamen ne povis plej baldaŭ forporti, kaj la mandarinoj facile putriĝis. Kia domaĝo!





# la ĉina fervojo

## ŜLOSILO DE LA PROBLEMO

En 1992 la totala produktovaloro de la ĉina industrio kreskis je pli ol 20%, tamen la transporta kapablo de la fervojo kreskis nur je 3%. Kio kaŭzis tiun staton?

Unu el la gravaj faktoroj estas malsufiĉo de mono. Dum multaj jaroj la investo por konstruo de fervojoj en Ĉinio konsistigis malgrandan elcenton. En 1953-1957 ĝi konsistigis 10.7% de la tuta investo de la nacia ekonomio, sed en 1976-1980 ĝi konsistigis 6.4% kaj en 1991 ĝi falis al 5%. En 1953-1962 ĉiujare Ĉinio konstruis ĉ. 1 000 km da fervojo, sed en 1991 nur 100 km. Ja pli kaj pli malmultiĝis la nova fervojo, tio certe estas mispaŝo.

En la lastaj jaroj iom post iom liberigis la varprezoj, multe levigis prezoj de diversaj varoj, inkl. de ŝtalo, ligno kaj aliaj materialoj. Nur fervojaj entreprenoj malmulte altigis la transportan prezon de post 1955. En tiaj statoj komercistoj multe enspezas, dum la fervojaj entreprenoj suferas deficiiton, kaj krome, ĉar la transporta prezo estas multe malpli alta ol tiu de aliaj trafikaj rimedoj, oni preferas veturi aŭ sendi varojn per fervojo, kio pli streĉas la fervojan transportadon.

Sub tiuj kondiĉoj la fervojaj entreprenoj povis nur ekspluati siajn proprajn latentajn fortojn. Ili elgaraĝigas ĉiujn vagonojn sur la vojojn kaj multe plilongigas trajnojn.

Fakte ĉiuj tiuj urĝaj rimedoj donas nur malgrandan efikon, sed ne povas radikale solvi la proble-

mon. Nun ĉinoj komprenis, ke por fari la fervojon avangardo de la nacia ekonomio, oni devas fari radikalan reformadon al la fervojoj.

## UNIKA VOJO — REFORMADO

La reformado de la ĉinaj fervojoj ĉefe estas ŝanĝo de la ekzistanta sistemo de administrado kaj entreprenado. Por tio la Fervoja Ministerio alprenis serion da novaj rimedoj:

Radikale ŝanĝi la tradician administran sistemon kaj rigardi la fervojan transporton kiel unu el la enhavoj de la merkata ekonomio;

Levi la prezon de la transportado, praktiki novan prezon sur la novaj fervojoj, altan prezon por bona servo kaj altan prezon por tre okupataj linioj;

Ŝanĝi la staton, ke la ŝtato sola konstruas fervojojn, kaj fondi la novan sistemon, ke la ŝtato, lokaj registaroj kaj eksterlandaj investantoj kune konstruu fervojojn.

Krome, la Fervoja Ministerio faris gravan ŝanĝon de la plano pri fervoja disvolviĝo en 1991-1995. En tiu periodo Ĉinio konstruos 6 600 km da novaj fervojoj, du-trakigos 4 100 km da fervojoj kaj elektrizos 5 600 km da fervojoj, dank' al tio ĉinaj fervojoj longos 60 000 km, el kiuj la du-trakaj kaj elektrizitaj fervojoj konsistigos 30% kaj 23% respektive. Por tiu celo 210 000 fervojistoj energie laboras en diversaj lokoj de la lando.

La nova plano de la fervoja konstruado estas jene:

La Fervojo de Pekino ĝis Jiu-long (Ĝiulong), 2 500 km longa,

trapasos 8 provincojn. Ĝi estos la plej longa trunka fervojo post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Laŭ la malnova plano oni plenumos ĝin en 1997, sed nun la ĉina registaro decidis fini la konstruadon en 1995. Ĝi estos alia forta vojo liganta la sudon kaj nordon de Ĉinio.

La Dutraka Fervojo de Wuwei ĝis Xinjiang (Ŝingĵang), 1 622 km longa, estas konstruata per investo de la centra kaj provincaj registaroj. Sur la tuta linio iros dizela lokomotivo, kaj la komunikado parte uzos optikajn kablojn. Tiu ĉi fervoja linio ludos gravan rolon por mildigi la malsufiĉon de la transportaj rimedoj en la Nordokcidento de Ĉinio kaj akceli la tiean ekonomian konstruadon.

La Fervojo de Baoji (Baŭĝji) ĝis Zhongwei (Ĝongŭej), 498.19 km longa, estos elektrizita je totala investo de 4.1 miliardoj da juanoj. Ĝi plenumiĝos en 1994. Ĝi estos alia nova trunka vojo de la Nordokcidento al la landinterno de Ĉinio kaj ankaŭ vojo promesdona por ekspluato de la naturaj riĉaĵoj en la tri provincoj de la Nordokcidento de Ĉinio kaj por riĉiĝo de la tieaj loĝantoj.

La Fervojo de Houma ĝis Yueshan, 365 km longa, estos trunka fervojo en la centra regiono de Ĉinio. Ĝi ludos gravan rolon en mildigo de la streĉiteco de la karba elportado el Shanxi-provinco.

Krom la supre menciitaj, estos konstruitaj ankaŭ dek novaj fervojoj en la Sudokcidento, Oriento kaj Nordoriento de Ĉinio. Ja pezan taskon alfrontas la ĉina fervojo!

# Kiujn landojn vizitis la ĉina navigisto Zheng He?

de WU WEN

**E**N 1492 la itala navigisto Kolumbo kaj liaj sekvantoj komisiite ekveturis de Sevilo, Hispanio, por serĉi vojon al Hindio, sed ili malkovris Amerikon anstataŭ Hindion. 1992 koincidis kun la 500-jara datreveno de la malkovro. En Sevilo oni okazigis mondiskalan foiron por soleni la 500-jaran datrevenon.

La 11-a de julio 1992 estis la 587-jara datreveno de la marnavigado far la granda ĉina navigisto Zheng He (1371-1435) de Ming-dinastio (1368-1644) al landoj en la Okcidenta Pacifiko kaj Hindia Oceano. Tiutage okazis en la urbo Kunming, la hejmloko de Zheng He, solena aktivado, inkl. de simpozio pri Zheng He, kiun partoprenis pli ol 100 ĉinaj kaj alilandaj fakuloj.

Zheng He komencis navigi pli frue ol Kolumbo je pli ol duonjarcento kaj superis lin laŭ la grandeco,

agad-kampo kaj navigtekniko de la flotoj. Tamen, en multaj historiaj libroj de Eŭropo ne estas loko, kiun meritas Zheng He. Tial s-ro Max Mulyadi Supangkat, estro de la indonezia delegacio partoprenanta en la aktivado, proponis, ke oni okazigu internacian simpozion pri Zheng He laŭvice en ĉiuj landoj kaj regionoj, kie siatempe estis Zheng He.

## MERITOPLENA KARIERO DE ZHENG HE

Zheng He vivis en la komenca periodo de Ming-dinastio.

Post sia surtroniĝo Zhu Yuanzhang, la unua imperiestro (1368-1398 sur trono) de la dinastio, praktikis la diplomatan politikon amikiĝi kun la najbaraj landoj. Li ripetfoje diris al siaj posteuloj kaj subuloj: "Faru batalon kontraŭ tiuj, kiuj minacas Ĉinion, kaj ne faru tion facilanime al tiuj, kiuj ne minacas nian landon." Imperiestro Zhu Di (1403-1424 sur trono), same kiel la patro, tenis amikajn rilatojn kun aliaj landoj. Li komisiis al eŭnuko Zheng He gvidi floton por marnavigado al aziaj kaj afrikaj landoj por fari negocon kaj amikan viziton.

Zheng He naskiĝis en huj-nacia familio, Yunnan-provinco kaj origine portis la familian nomon Ma. En la infanaĝo li servis kiel eŭnuko en la imperiestra palaco de Pekino. Poste, pro sia merito li estis ŝatata de la imperiestro, kiu donis al li la familian nomon Zheng, kaj promociis lin al ofico pri konstruado de domoj kaj tomboj por la imperiestra familio kaj aĉetado por ĝiaj geedziĝa aŭ funebra ceremonio. Komence Zheng He kredis je islamo kaj poste je budhismo. La budhistoj prenas Ŝakjamunion, lian doktrinon kaj bonzojn kiel tri trezorojn ("tri trezoroj" elp. ĉine San Bao), tial oni nomis lin ankaŭ Eŭnuko San Bao. Julie de 1405, li komisiite ekveturis kun floto sub sia gvido al la Sudorienta Azio kaj Hindia Oceano. La floto el 62 ŝipoj kun 27 800 militistoj kaj granda kvanto da oro, silko kaj aliaj varoj ekveturis de Liujiahe (Liŭĝjahe) de Suzhou al Fujian (Fuĝjan). Atinginte la lokon, la floto daŭrigis sian navigadon de Wuhumen de Fujian kaj alvenis al Champa (nun suda Vjetnamio), Javo, Palembang, Samudra (nun Indonezio), Malaka (nun Malajzio), Calicut (nun suda Hindio) k.a. En 1407 Zheng He kune kun siaj subuloj revenis al la hejmlando. De





tiam ĝis 1433 li sesfoje faris navigadon en sama direkto kaj vizitis pli ol 30 landojn. La plej granda nombro de la ŝipoj por unufoja navigado sub lia gvido estis 249 kaj la plej foraj lokoj atingitaj de la floto estis Mogedoxu (nun Mogadiŝo) ĉe la marbordo de Nordorienta Afriko, Brawa (nun Somalio) kaj Melinde (nun Kenjo).

En ĉiu lando, kie Zheng He estis, kiel sendito de Ming-dinastio, li transdonis donacon de la imperiestro al la reĝo aŭ ŝtatestro, esprimis la deziron starigi diplomatajn rilatojn kaj invitis tiun viziti Ĉinion. Ĉiufoje, kiam li revenis la patrolandon de navigado, li ĉiam kunportis kun si multajn alilandajn ŝtatestrojn kaj senditojn kaj iliajn donacojn. En la sekva navigado li veturigis ilin kun reciprokaj donacoj al ties landoj. En pli ol 20 jaroj Ĉinio starigis diplomatajn rilatojn kun 40 landoj. Kiam Zheng He finis la kvinan navigadon, li revenis hejmlandon kune kun 1 200 alilandaj senditoj.

La navigado akcelis la eksteran komercon de Ĉinio. Kie ajn estis la ŝiparo plensargita per porcelanaĵoj, silko kaj juveloj, la ŝipanoj negocis kun lokaj oficistoj kaj komercistoj kaj aĉetis grandan kvanton da eburo, juveloj, perloj, koraloj kaj parfumo por la imperiestra familio kaj nobeloj kaj importis grenon, kotonon, ŝtonon, medikamenton kaj kupro.

La navigado akcelis ankaŭ la politikan, ekonomian kaj kulturen interŝanĝon inter Ĉinio kaj landoj en Azio kaj Afriko kaj pliigis la amikecon inter diverslandaj popoloj. Kiel diris s-ro Hasim el Malajzio, kiu partoprenis en la aktivado: "En Malajzio Zheng He estas vaste konata kaj respektata. Li alportis pacon kaj amikecon al nia popolo. Li propagandis ne nur ĉinan kulturon, sed ankaŭ la islaman."

## **AVANGARDAJ ŜIPKONSTRUA INDUSTRIO KAJ NAVIGTEKNIKO**

La granda floto gvidata de Zheng He traveturis la Hindian Oceanon kaj rekte atingis Orientafrikon. Tio plene montris la nivelon de ŝipkonstrua industrio kaj navigtekniko de la tiama Ĉinio.

Historia libro diras, ke la plej granda ŝipo de la floto, longa je 151m kaj larĝa je 61m, povis enteni almenaŭ 1 000 personojn. Ĝi estis la plej granda ŝipo siatempe. La ŝipkonstrua industrio de Ĉinio prosperis en Song- kaj Yuan-dinastioj (960-1368) kaj en la komenca periodo de Ming-dinastio ĝi disvolviĝis plu. Tiam estis sufiĉe grandaj ŝipfarejoj en iuj gravaj havenurboj. Longjiang (Longĝjang)-ŝipfarejo proksime de Sancha-rivero de Nankino estis ŝipfarejo, kie oni faris grandan ŝipon en Ming-dinastio. Nun sur ruino de la ŝipfarejo estas paralelaj ŝiplitoj. En 1957 oni elterigis en iu ŝiplito stirilon je 11.07m longan. Probable, ĝi estis uzata por granda marŝipo.

La navigtekniko de la floto estis la plej avangarda en la mondo siatempe. Oni ne nur uzis kompason, sed ankaŭ lokalizis kaj orientis la ŝipojn surbaze de

teorioj de astronomio kaj geografio. Kompasso estas unu el la kvar grandaj inventoj de la antikva Ĉinio. Komence de la 12-a jc. ĉinoj jam uzis kompason en marnavigado. Poste, oni reformis kompason kaj elfaris gradigitan platon kun kompasso en la mezo, kio multe faciligis la uzadon.

Dum la navigado Zheng He notis la geografian situon de ĉiu vizitita lando, distancon kaj direkton de navigado, ankrejojn, rifojn kaj malprofundaĵojn sur la vojo, kaj desegnis skeman mapon de navigado. Ĝi estas la plej frua mapo de Ĉinio por marnavigado kaj tre utilas al la mara trafiko inter la Oriento kaj Okcidento.

## **KIUJN LANDOJN ZHENG HE VIZITIS?**

Koncerne tiun demandon, estas diversaj notoj en historiaj verkoj.

En la ĉapitro "Biografio de Zheng He" el la "Historio de Ming-dinastio" estas notite: "Zheng He oficistis dum la regado de tri imperiestroj. Li estis komisiita fari navigadon sepfoje kaj vizitis Champa, Javo, Kamboja..., sume pli ol 30 landojn." En la libro estas menciitaj 37 landoj. Ma Huan, kiu trifoje akompanis Zheng He en la navigado, verkis la libron "YING YA SHENG LAN", kie legiĝas la geografia situo, urbaj konstruoj, klimato, produktaĵoj kaj moroj de 20 landoj vizititaj de li. Fei Xin (Fej Ŝin), kiu kvarfoje akompanis Zheng He en la navigado, verkis la libron "XING CHA SHENG LAN" en du volumoj. La unua volumo prezentas la de li vizititajn 22 landojn kaj la dua — la de li aŭditajn 23 landojn.

La nombro de la landoj menciitaj en la supre diritaj libroj ne estas sama; kaj krome inter ili iuj estas nur insuloj aŭ lokoj sed ne landoj; aliaj estas vizititaj ne de Zheng He mem, sed de aliaj senditoj; kaj la situo de iuj landoj ankoraŭ estas enigmo eĉ nun.

En 1431 Zheng He lastfoje faris navigadon laŭ komisiio. Li starigis monumenton en Changle, Fujian, kun surskribo de Zheng He. Sur ĝi legiĝas la nomoj de Champa, Javo, Palembang, Siam, Aden, Mogedoxu, Brawa..., sume pli ol 30 landoj. Ĝenerale, oni kredas tiun ciferon. Sed sur la surskribo legiĝas nur 14 landnomoj. Historiistoj konsultis malsamajn verkojn de Ma Huan kaj Fei Xin kaj aliajn materialojn en sia esploro, tial ili havas malsamajn konkludojn pri la nombro de la landoj, kiujn Zheng He vizitis.

## **LEGENDOJ PRI ZHENG HE**

Nun ekzistas ankoraŭ malsamaj opinioj pri la preciza nombro de la landoj, kie estis Zheng He, tamen la fakto montras, ke Zheng He estis en la Sudorienta Azio, Malaja Duoninsulo, Malaja Insularo, Hindia Duoninsulo, insuloj en la Hindia Oceano, Persa Golfo kaj landoj arabaj kaj afrikaj. Nun en multaj lokoj ankoraŭ cirkulas legendoj pri Zheng He kaj konserviĝas historiaj objektoj pri lia

restado.

Ĉe la norda marbordo de Javo estas urbo Semarang (la tieaj ĉinoj nomas ĝin Sam Po Tong). La nomo Sam Po Tong estas donita ĝuste por memori pri Zheng He. En la okcidenta antaŭurbo de Sam Po Tong oni konstruis la templon Sam Po, kie surbordiĝis Zheng He kaj liaj sekvantoj. En la templo estas la plena statuo de Zheng He. Tie estas ankaŭ antikva puto nomata Sam Po kun akvo dolĉa kaj klara.

Malako estis loko nepre trairata de Zheng He en sia navigacio. Kiam li atingis Malakon en sia tria navigado, kun la konsento de la malaka reĝo li konstruis tie urbomurojn kun urbeto ene por teni grenon kaj aliajn varojn. Nun tie videblas ĝia ruino. Ankaŭ en Malako estas antikvaj templo kaj puto nomataj Sam Po. En la Malaka Markolo inter Indonezio kaj Malajzio, malajziaj fiŝistoj ofte kaptas fiŝojn kun po kvin makuloj ambaŭflanke de la korpo. La fiŝo portas la nomon s-ro Sam Po. Laŭdire, kiam la floto de Zheng He trairis la Malakan Markolon, fiŝo saltis sur la ŝipon de Zheng He, kiu kaptis la fiŝon kaj enmarigis ĝin. Pro tio fingrosignoj de Zheng He vidiĝas sur la fiŝo, kaj ĝi ekhavis sur si makulojn.

En la Nacia Muzeo de Kolombo, Sri-Lankao, estas ŝtona monumento kun surskribo en la lingvoj tamula, persa kaj ĉina. La ĉinlingva teksto temas pri la kulto kaj donaco de la imperiestro de Ming-dinastio al la budho. La monumento estis starigita de Zheng He en 1409, kiam li vizitis la landon.

En la Kultura Centro de Salalo en Suda Omano konserviĝas porcelanaĵoj kaj kupraj moneroj de Ming-dinastio de Ĉinio. Zheng He dufoje vizitis la lokon kun legitimita letero kaj donaco. Ma Huan detale notis tion en sia verko. Probable, la porcelanaĵoj kaj kupraj moneroj en la kultura centro estis kunportitaj de la floto gvidata de Zheng He.

Kompreneble ankaŭ en Ĉinio estas multaj legendoj pri Zheng He kaj liaj postlasaĵoj. ■

JIA WEN:

# Strebo de esperantisto

**E**N la pasinta vintro, nia samideano prof. Dai Liming vizitis la redakcion de EPC, kunportante al ni vidtelefonon.

La vid-telefono tuj interesis min kaj miajn kolegojn. Ni multe demandis lin pri la vid-telefono. Kaj li kun ĝojo montris al ni, kiel uzi la telefonon.

Mi vidis, ke la strukturo de la aparato estas nekomplika. Ĝi havas nur tri pliajn partojn, kiuj mankas en ordinara telefono, t.e. monitoro, videoregistratoro kaj malgranda ekrano.

Unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj. Vere mirinda estas la vid-

telefono! Kiam prof. Dai telefonis al sia amiko, kiu estis en Zhuhai (Ĝuhaj) kelkmil km. for de Pekino, sur la ekrano aperis klara bildo de lia amiko. S-ro Dai diris al mi, ke tiutempe li, mi kaj aliaj apudstarantoj aperis sur la ekrano de la telefono de lia interparolanto. Dank' al la vid-telefono, oni povas interparoli vid-al-vide malgraŭ tre longa distanco.

Prof. Dai informis al ni, ke la aparato havas ankaŭ telefotografan funkcion. En kelkaj sekundoj ĝi povas sendi dokumenton, leteron, grafikajon, daktilogramon, kontrakton, mendilon, medicinan ateston, kuracan bildon k.a. al ajna loko de la mondo se ankaŭ la alvokito havas la aparaton. Oni

Alilandanoj laboras en la korporacio.





uzas ĝin ankaŭ por observi produktojn, ŝaktan laborejon kaj arbaron. Pro sia vasta aplikado, ĝi funkcias kiel informanto sur diversaj kampoj kaj ideala akompananto en nia ĉiutaga vivo.

Prof. Dai estas ĉ. 50-jara. Li mezstatura, kun miopaj okulvitroj, estas forta, malkaŝema kaj parolema. Li donis al mi profundan impreson. Li ĉiam laboras energie kaj senlace. Post diplomitiĝo el la geologia fakultato, li preferis labori en malproksima landlima regiono por serĉi minaĵojn ol instrui en supera lernejo. Li klopodis en montoj 18 jarojn, li hardis sian volon kaj fortigis sian korpon en la peniga laboro sub la libera ĉielo.

En la 80-aj jaroj li laboris kiel instruisto en la Changchun-a Geologia Instituto en nordorienta Ĉinio. Komence de la 90-aj jaroj li venis en Zhuhai, ĉemaran urbon en suda Ĉinio por fondi altteknikan entreprenon. Sub lia gvido, oni sukcese produktis vid-telefonon kun marko "Hopestar" (Stelo de Espero) kaj aliajn produktaĵojn.

Printempe de 1993, li venis en Pekinon por partopreni ekspozicion pri altteknikaj produktaĵoj. En la eksponejo mi renkontis lin. Li diris al mi, ke multaj vizitis lian standon. Oni tre ŝatis la vid-telefonon. Multaj aĉetis la aparaton. Elĉerpiĝis ankaŭ la ekspozitaĵoj.

Krom 6-specaj vid-telefonoj kun malsamaj funkcioj en la eksponejo vidiĝis ankaŭ 7-specaj komputeroj: **KOMPUTERO POR INFANOJ**. Helpate de ĝi 3-8-jaraj infanoj pli bone lernas lingvojn, pentradon kaj faras ludon. Ĝi estas efika en ekspluato de intelekto. **LERNA APARATO POR KNABOJ**. Helpate de ĝi 9-16-jaraj geknaboj povas lerni matematikon, tajpi en la angla lingvo, komponi muzikon kaj fari pentraĵon. **LINGVO-INSTRUA KOMPUTERO**. Sur ĝia ekrano vidiĝas vortoj kaj bildoj, de ĝi aŭdiĝas ankaŭ sono de koncernaj vortoj. Kun ĝi oni povas sukcese lerni lingvojn. **VORTO-ARANĜA KOMPUTERO** estas aŭtomata instalaĵo destinita por oficaj laboroj. **CIFERA PRESILO** posedas 4 funkciojn t.e. duplikato, ofseto, mimeografado kaj rapida presado. **KOMPUTERO PER TUŜO SUR EKRANO** havas plurajn funkciojn. Tuŝante ĝian ekranon, oni povas verki kaj komponi sen manipuli la klavaron.

La vid-telefono kaj supre menciitaj komputeroj havas ĉiu Esperantan markon. Prof. Dai speciale instalas Esperantan klavaron sur komputeroj.

Tiuj alt-teknikaj produktaĵoj estas faritaj de la Korporacio de Sciencaj kaj Teknikaj Entreprenejoj (Hopestar), fondita de prof. Dai.

En la komencaj tagoj de la fondiĝo de la korporacio prof. Dai renkontis multajn malfacilojn: La korporacio havis nur kelkajn ĉambrojn kaj tablojn. La instalaĵoj kaj la cirkula kapitalo valoris entute malpli ol milionon da juanoj. Dank' al ilia peniga laborado, la korporacio pligrandiĝis iom post iom kaj ĝi havas hodiaŭ siajn proprajn ofidomon, loĝdomon kaj eksponejon. Ĉiu ĝia laboranto havas 2 komputerojn. En 1993, ĝia produktovaloro atingos 100 milionojn da juanoj. Estas menciinde, ke inter ĝiaj laborantoj estas 3 ĉinaj esperantistoj kaj 3 alilandaj esperantistoj. Iliaj laborlingvoj estas la han-a, angla, rusa, kaj Esperanto.

Mi estas tre ĝoja pro la sukcesoj de s-ro Dai. Mi demandis lin: "Vi estas profesoro. Kial vi forlasis vian geologian fakon kaj vin okupas pri ekonomiaj aferoj?"

Kun rideto li respondis, ke ĝenerale dirite, esperantistoj kaj Esperantaj organizoj estas malriĉaj, kio malutilas al disvolviĝo de Esperantaj aferoj. Li fondis la korporacion kun du celoj: gajni monon por helpi E-movadon; kaj pli energie studi Esperanton kaj disvolvi Esperanton en la informa epoko.


Prof. Dai estas homo multtalenta. Li ŝatas muzikon kaj filatelon. Li ludas plurajn muzikilojn kaj eĉ komponas muzikon. Pro filatelo li amas Esperanton pli profunde. Kiam li estis 12-jara, li legis artikolon pri Esperanto en filatela revuo, kaj tiam li ekinteresiĝis pri Esperanto kaj ĝin mem lernis. Li alte taksas la rolon de Esperanto. Nun li studas pri la diferencoj de naciaj lingvoj kaj ĝenerala leĝo de ilia evoluo, kun espero trovi novan vojon por enkomputerigi diversnaciajn lingvojn kaj lernigi pere de Esperanto aliajn naciajn lingvojn al tiuj, kiuj scias iun ajn nacian lingvon.

"Ĉu tio estas ebla?" mi demandis.

"Mi studis plurajn jarojn. Mi kredas, ke ĝi estas ebla," li respondis. ■

Laborantoj de la korporacio





Esperantistineto Rava

WANG LIHUA:

# Rava, denaska esperantistino

“**P**AĈJO, malfermu la pordon!” infana voĉo rompita la tagmezajn kvieton de hotela koridoro. “Ĉu ĝi parolas Esperante?” De scivolemo, mi malfermis mian pordon kaj vidis: Iu knabineto staras antaŭ la pordo de mia najbara ĉambro. Vidinte min, ŝi eksilentis. “Ĉu estas ŝi?” Mi iris al ŝi kaj ŝin demandis Esperante: “Kiom da jaroj vi havas?”

“Tri!” ŝi respondis en Esperanto, ĵetinte rigardon al mi.

La pordo malfermiĝis, ŝi rapide eniris. “Mi volas dormi.” aŭdiĝis ŝia voĉo el la ĉambro.

Mi eniris en la ĉambron, ricevinte permeson de la mastroj. Ili estis juna geedza paro. La viro, kun bukletaj haroj, estas nealta, dum la virino estas svelta, en okulvitroj kaj kun longaj haroj libere kunligitaj post la kapo. La knabino jam enlitiĝis kaj levis de tempo al tempo la litkovrilon por ŝtele rigardi min. Mi min prezentis al la geedzoj kaj klarigis al ili la intencan de mia alveno. Reciprokinde rigardon, ili diris al mi kun rideto: “Por tion klarigi ni devas unue konigi al vi nian konatiĝon.”

Aŭguste de 1985, en la trajno de Pekino al Kunming, la ĉefurbo de Yunnan-provinco, membroj de la Pekina E-Asocio, partoprenan-

taj la 1-an Ĉinan E-kongreson, faris vortludon. Oni ne sciis, de kiam ĉe ili aperis iu konkursantino. Ŝi nomiĝas Nubo, esperantistino el Shanxi (Ŝanŝji)-provinco. Ankaŭ ŝi vojaĝis al Kunming por partopreni la kongreson. Jen la patrino de la supre menciita knabineto. Tiam, ŝi certe ne rimarkis, ke iu junulo fiksas sian rigardon al ŝi jam longe. Li estas Gajo, membro de la Pekina E-Asocio, ŝia estonta edzo.

Ili konatiĝis en la vojaĝo, kaj poste okazis ilia ama aventuro. En la bela urbo Kunming ili enamigis kaj tuj poste komencis konstantan korespondadon. Finfine, ili geedziĝis, kaj poste ili havis sian filinon Rava. Je mencio pri sia amhistorio, S-ino Nubo fiere diris al mi: “Nia sva-

tistino estis Esperanto.”

Por esperantistigi sian filinon ili faris multon.

“Ni ja komencis nian edukon al ŝi, kiam ŝi estis fetoto,” s-ino Nubo diris al mi: “Tiam Gajo kaj mi vivis en du lokoj. Li laboris en Pekino kaj mi, en Shanxi-provinco. En mia loĝejo mi algluis multajn fotojn, sur ĉiu el ili mi faris Esperantan noton. Rigardante tiujn bildojn, mi voĉlegis Esperantajn tekstojn por la fetoto. Vespere, kiam mi sopiris al mia edzo, mi kantis Esperantajn kantojn por ĝi. Post kiam mi transloĝiĝis en Pekinon, ni ekhavis pli da ŝancoj paroli Esperanton.”

Je tio, s-ro Gajo daŭrigis: “Nia klopodo bone rikoltis. La unua vorto, kiun nia filino Rava diris, estis en Esperanto. Ni ege ĝojis pro tio!”

Ili informis al mi ankaŭ, ke

Germana esperantisto Otto Nitsche (dekstre), Rava kaj ŝiaj gepatroj



hejme ili ĉiam parolis Esperante kaj klarigis al Rava per Esperanto ĉion, kion ŝi volis scii.

Montrante Rava, Nubo diris al mi: "Influante de ni, ŝi jam kutimiĝis paroli Esperanton."

Denaske Rava vivas en Esperantujo. Kiam ŝi estis 2-jara, ŝi eniris en infanĝardenon. Sed en la unua tago de ŝia infanĝardena vivo okazis ridindaĵo. Antaŭ sies-to, Rava volis iri al tualetejo kaj diris Esperante al sia vartistino: "Mi volas pisi!" Sed la vartistino ne komprenis kaj ŝi, ne sciante paroli en han-lingvo, daŭre kriis Esperante: "Mi volas pisi!" Finfine, ŝi pisis en pantalonon, kaj nur post tio la vartistino ekkomprenis. Pro tio, en la infanĝardeno, oni donis al ŝi la moknomon Pisi.

Por ke ŝi povu paroli kun aliaj homoj, la geedzoj ekinstruis ŝin paroli han-lingve. La 2-jaraj infanoj estas lertaj kaj saĝaj en lingvolernado. Baldaŭ Rava parolis han-lingve tiel bone, kiel aliaj infanoj.

Estante infano, ŝi iam estis maldiligenta. Ŝi parolis han-lingve, se la vorto estas malfacile prononcata Esperante, ekz., banana kaj elefanto estas prononcataj nur per 2 silaboj en la ĉina lingvo, sed Esperante per pluraj silaboj. Pro tio, la geedzoj decidis ne doni al ŝi la deziratan objekton, se ŝi ne esprimis sian ideon Esperante.

Nubo konigis al mi interesan historion: Foje pro ia afero ŝi konfidis Rava al ties avino. Kiam la avino kaj la nepino kune rigardis bildolibron, montrante tigron en la bildo, Rava diris Esperante al sia avino: "Estas tigro." La maljunulino ne komprenis, sed Rava ripetis en Esperanto. La maljunulino ekflamiĝis: "Estante ĉino, kial vi ne parolas ĉine?" Tamen pro amo al sia nepino la maljunulino toleris tion kaj eĉ eklernis Esperantajn vortojn de la infaneto.

"Antaŭe, oni ne komprenis nin kaj diris, ke ni vane malŝparis tempon. Post kiam ŝi pisis en pantalonon en infanĝardeno, ankaŭ

Rava ne volis paroli Esperanton," daŭrigis Nubo post momenta silento: "Sed, ni ne perdis la kuraĝon kaj senĉese lernigis al ŝi Esperanton. Nun multaj envias malgrandan Rava. Ŝiaj vartistinoj kaj kamaradetoj ofte lernas Esperanton de ŝi kaj ameme nomas ŝin instruistino Pisi."

En la jarfino de 1991, Rava kaj ŝiaj gepatroj kune partoprenis la Duan Ĉinan E-Kongreson okazintan en Tangshan. Tiam Rava fariĝis multe atentata persono, ĉar ŝi

estis la plej juna esperantistino el la ĉeestantoj de la kongreso. En la renkontiĝo de esperantistoj ŝi kantis Esperantan kanton "Malgranda Muso", ŝia patro prezentis Esperantan humuran dialogon kaj ŝia patrino dancis dancon. Ilia prezentado akiris varmajn aplaŭdojn de la spektantoj.

Aŭguste de 1992, ili partoprenis en la Kvina Pacifika Kongreso de Esperanto en Qingdao (Ĉingdaŭ). Kien ajn ili iris, tie ili estis fervore akceptataj. ■

## AMUZOJ

### Humuraĵoj

#### Fumi kaj cerbumi

Filo demandis sian patron: "Paĉjo, pro kio vi fumas?"

"Mi cerbumas."

"Jen pro kio vi ĉiam riproĉas min, ke mi lernas, ne cerbumante."

"Kial?"

"Ĉar mi ne fumas."



#### Patro kaj filo

Patro: "Mia kara filo, se vi ne sukcesos en la ekzamenoj por eniri en kolezion, vi do ne estos mia filo."

Filo: "Bone, paĉjo! Se mi sukcesos, vi do ne estos mia patro!"

#### Historio ripetas

Iu demandis instruiston: "Bonvolu diri al mi, ĉu mia filo bone lernas historion? Antaŭe,

kiam mi estis lerneĵano, mi ne ŝatis tiun kurson. Foje mi eĉ ne trapasis la ekzamenon."

Instruisto: "La historio ripetas."

### Manĝbastonetoj kaj iliaj enigmoj

Manĝbastonetoj, ĉinaj manĝiloj, estas faritaj plejparte el ligno kaj bambuo. De multaj jaroj cirkulas en Ĉinio enigmoj pri manĝbastonetoj. Ĉi-sube ni konigos al vi kelkajn.

I. Du fratinoj kun sama staturo ĉiam frekventas kune kuirrejon kaj gustumas la unuajn manĝaĵojn amaran, dolĉan, pikan kaj acidan.

II. Tiuj kun ronda piedo kaj kvadrata kapo iras ĉiam duope. Ĉiutage oni uzas ilin 2-3-foje kaj nokte ili ne laboras.

III. Naskiĝinte en bambua vilaĝo, ili, altaj dekelkajn centimetrojn, vivas ĉiam en amareco kaj ne povas revidi sian naskiĝlokon dum la tuta vivo.

IV. La sveltaj ĝemelinoj preferas pladojn al supo.

V. Samstaturaj fratinoj ĉiam la unuaj scias guston ĉe la tablo.

VI. Kvankam la du maljunuloj kun sama staturo ofte manĝas viandon kaj fiŝon, sed ili restas por eterne maldikaj.



## Vojaĝo al la 5-a Pacifika Kongreso en Ĉinio

de MARCEL DELFORGE (Belgio)

De la 7-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1992 mi flugis al Ĉinio kaj kun aliaj samideanoj el ostenda grupo "La Konko" vizitis plurajn urbojn.

Tuj kiam vi trairas Pekinon, vi mire konstatas, ke ĉie oni konstruas novajn vojojn, hotelojn, loĝkonstruaĵojn ktp... Vere, la homoj ĉi tie estas ege laboremaj! Krom tio, impresas la eksterlandanojn la terure granda amaso da personoj surstrate: ĉie svarmas homoj! Niaj hoteloj estis komfortaj kaj ni vizitis kutimajn pekinajn vidindaĵojn. Ni ankaŭ havis la ŝancon viziti la redakcejon de la revuo "El Popola Ĉinio".

Post kelkaj tagoj ni tutan nokton trajne vojaĝis al Qufu (Ĉjufu) en Shandong-provinco, tre grava loko de konfucea filozofio. Buse ni iris al Jinan (Ĝjnan), ĉefurbo de la provinco Shandong, kaj ĉie estis esperantistoj, ĉie estis gvidantoj. Kelkfoje okazis, ke ni havis du interpretistojn, unu en la franca, la alian en Esperanto!

Ĝis la kongresurbo Qingdao (Ĉingdaŭ) ĉe la Flava Maro ni bezonis vojaĝi trajne 500 km. Tuj post nia alveno en Qingdao membroj de LKK helpis nin, eĉ portante niajn valizojn! Dum la amikiĝa vespero konstatablas, ke la Pacifika Kongreso estas tute alia agrabla sperto. Ĉiuj volas paroli kun vi, volas foti kun vi, havas multajn demandojn: De kie vi venas? Kiam vi lernis la lingvon? Ĉu vi poste vizitos nin? Ĉarma kaj amika etoso...

Krom tiu atmosfero okazis tre interesaj aranĝoj: Aplikado de Esperanto en komerca/turisma fakoj, klarigoj pri ĉina kuracado kaj ĉina kuirarto. Sufiĉe bona loka biero sensoifigis nin.

Konklude, mi ne bedaŭris la vojaĝon al la Pacifika Kongreso. ■

## Decembra semajno en Pekino

de JORMA AHOMÄKI (Finnlando)



S-ro J. Ahomäki (la dua de maldekstre) kaj pekinaj esperantistoj en Zamenhof-festo

Estis al mi granda plezuro pasigi decembre 1992 en Pekino sunbrilan semajnon.

Dimanĉe de la 13-a de decembro 1992, je la 9-a horo matene komenciĝis la Zamenhofa festo de peki-

naj esperantistoj. La kunsidon prezidis s-ro Li Shijun (Li Ŝigjun). Iuj eventuale konas lian plumnomon "Laŭlum" pere de liaj multnombraj tradukaĵoj el la ĉina en Esperanton. Hejmeca, varma ondo inundis min, kiam li menciis siajn finnajn leteramikojn, kiuj estas konataj ankaŭ al mi persone. La ĉefa temo de la kunsido estis la agado de s-ro Tokuda Rokuro el Japanio. Li ja estas pioniro, multe kontribuanta por la amikeco inter ĉinaj kaj japanaj esperantistoj. Estis vere unika sento sidi tie fore el la hejmurbo inter ĉinaj gesamideanoj kaj sekvi la prezentadojn en flua Esperanto. Sen troigo oni povas diri, ke tiu ĉi Zamenhof-festo restas al mi neforgesebla sperto.

Dum la renkontiĝo kun pekinaj gesamideanoj en la sidejo de Esperanto-eldonejo ekde la unua momento regis amika kaj senpera atmosfero, kiu permesis fruktodonan, inspiran kaj viglan interŝanĝon de opinioj kaj spertoj. Kaj usona profesoro David K. Jordan havis koincidan viziton en Pekino. Li estas antropologo el Kalifornio. Multflankan diskutadon oni daŭrigis poste ĉe la festa manĝotablo aranĝita laŭ la ĉina maniero.

En la luksa gastosalono de Radio Pekino kolektiĝis iun decembran posttagmezon preskaŭ la tuta laborteamo de la Esperanto-sekcio por renkonti du eksterlandajn gastojn — prof. Jordan el Usono kaj s-ron Ahomäki el Finnlando. Ĉiuj ge-

# Ĉinio: lando de revoj

de **GOLAM AZAR-HUSHANG**(Irano)

De mia infaneco vizito al Ĉinio estis granda sopiro por mi. Mistera kaj vasta lando kun brila kaj antikva civilizacio. Dum la juneco mia sento pri Ĉinio pli kaj pli profundigis.

La historio de Ĉinio estas iom simila al tiu de Irano. Inter Irano kaj Ĉinio, kiuj estis tre vastaj imperioj, ekzistis longa vojo, kiu nomiĝis "Silka Vojo", kaj per tio komercaj kaj kulturaj rilatoj bone funkciis. En mezepoko mongoloj atakis Ĉinion kaj Iranon, kaj tio kaŭzis grandajn damaĝojn.

Ĉiam mi pensis, ĉu eblas iam vojaĝi al Ĉinio kaj vidi la vivon de ĝia popolo. Krome, mi zorgis, en kiu lingvo mi povas paroli kun ili. Konatiĝo kun Esperanto malfermis la pordojn de diversaj landoj. Pere de Esperanto mi povas paroli kun multaj popoloj tra la mondo. Nevideblaj fadenoj de amo, amikeco, paco kaj libereco, pere de Esperanto, greftis min kun popoloj de la tuta mondo. Kaj mi ne plu timis esti muta en Ĉinio, kaj mia vojaĝo al Ĉinio komenciĝis.

La verda flago de Esperanto renkontis min en la flughaveno de Pekino, kaj mi premis la manon de samideano de la Ĉina Esperanto-Ligo. En Pekino mi vizitis la Imperiestran Palacon, la Grandan Muron, la Someran Palacon kaj aliajn vidindejojn kaj historiajn restaĵojn. En Ĉinio ĉie estis multaj homoj kun bicikloj. Ankaŭ mi biciklis unu tagon en Tianjin (Tjanĝin).

La ĉina ekonomia reformado prosperigis la privatan sektoron. Miloj da grandaj kaj malgrandaj privataj vendejoj aperis en diversaj urboj.

La bazaro de komerco estas tre vigla, kaj oni povas alveni tien facile. Reklamoj pri varoj kreskas tre rapide. Ĉinaj vendistoj ekservas per okcidentaj komercaĵoj "Mc Donalds", "Fried Chicken" kaj "Coca Cola", vokas homojn kaj diras, ke ili forlasu siajn tradiciajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kaj akceptu novajn kaj okcidentajn nutraĵojn.

Ĉinio iras antaŭen, ankoraŭ estas sukcesa lando kaj havas bonan ekonomian kreskon. Kvarono de la monda loĝantaro vivas en Ĉinio kaj esperas pli bonan estontecon. Estas ege malfacile garantiĝi manĝaĵojn, loĝejojn, bonfartajn rimedojn por tiuj loĝantoj.

Mi kredas, ke la ĉina popolo kiel kutime sukcesos solvi siajn problemojn. ■

redaktoroj rakontis pri siaj specialaj taskoj en la radia laboro. Evidentiĝis, ke Radio Pekino kuraĝigas kaj siajn aŭskultantojn kaj esperantistojn ĝenerale por vojaĝi ĉu turisme ĉu negoce al Ĉinio. Ili bone servos al la vizitontoj kaj ĉion eblan aranĝos. ■

## POR VIA SANO

# Saniga ĉigong-terapio (II)

### 3. INTERNA ĈIGONG-O DE BODHI-DHARMA


Tiu ekzercado estas farata sur lito, antaŭ kaj post dormo. Kuŝu surdorse, malbutonu la subvestojn. Englutu aeron du fojojn. Per la dekstra manplato frotu la maldekstran bruston livume 40-50 fojojn de supre malsupren. Englutu de-nove aeron du fojojn kaj faru la samon per la maldekstra manplato. Frotu la ventron kaj bruston tiom da fojoj, kiom vi volas. Tiam ne plu englutu aeron (Bildoj 8 kaj 9). (Virinoj frotu nur la ventron, sed neniel la mamojn!)

Tiu ekzercado estas utila por akceli metabolon, sanigi la internajn organojn kaj preventi kanceron, hepatiton, galan litiazon kaj kormal-sanon.

### 4. EKZERCADO POR VIGLIGI LA VITALAN ESENCON

Ĉigong-istoj opinias, ke la medolo estas plena de vitala esenco tre grava por la vivo, same kiel benzino en aŭto. Se benzino sufiĉas,

(Daŭrigo sur p. 39)





## ESP-NOVAĴOJ

● La 19-an de marto 1993 la Dua Komitato de la Pekina Esperanto-Asocio okazigis sian duan sesion. La partoprenantoj donis siajn proponojn pri la laboro farota de la komitatanoj kaj konsilantoj por la E-movado de Pekino. Ili ankaŭ diskutis pri la laboro de la komitato.

● Fine de 1992 la Japana Internacia Instituto de Preventa Medicina Praktiko kaj Ĉin-medicina Lernejo de Jiaozuo (Ĝjaŭzŭo), Henan-provinco, subskribis kontrakton por funkciigi kurson kaj kuracejon pri la orienta speciala diina masaĝo en Jiaozuo. La unua kurso ekfunkcios en junio ĉi-jare. Esperanto estos parolata en la kurso. S-ro Masayuki Saionji Saiki, estro de la instituto, kreis la masaĝon. En la Kvina Pacifika Kongreso de Esperanto okazinta en aŭgusto 1992 li prelegis pri la masaĝo kaj demonstris ĝin.

● De 1993, en Chengde-universitato de Hebei-provinco Esperanto estas instruata kiel deviga lernobjekto. En la fakultatoj de la universitato oni lernigas Esperanton.

● En marto 1993 francaj esperantistoj geedzoz Trillet vizitis Ĉinion. Akompanate de ĉinaj esperantistoj, ili rigardis Pekinon, Hangzhou (Hangĝoŭ), Suzhou (Suĝoŭ), Ŝanhajon kaj Jinan (Ĝĵinan) kaj surgrimpis Taishan-monton. Ili dufoje vizitis ĈEL kaj la redakcion de EPC kaj interŝanĝis opiniojn pri E-movado kun ĉinaj esperantistoj.

● La 15-an de marto la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis memorigan poŝtmarkon pri la Oka Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio. En la sama tago la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco, uzis Esperantan poŝtstampilon projektitan de s-ro Zhang Linrui (Ĝang Linĵuj).

● De la 9-a ĝis la 16-a de okto-

bro 1993 okazos la 1-a Internacia Kultura kaj Turisma Semajno en Sant Cugat del Vallés, Barcelono, Hispanio, sub la aŭspicioj de la Hispana Esperanto-Muzeo. Estas antaŭviditaj prelegoj, konversacia kurso, vesperaj aranĝoj kaj ekskursoj. Pliaj informoj ĉe: Hispana Esperanto-Fervojista Asocio, Poŝtkesto 15027, E-08080 Barcelono, Katalunio, Hispanio.

● Ekde novembro 1992 japana samideano TANAKA Hiroaki redaktas kaj eldonas en Esperanto resumon de "Novaĵletero" de la Japana Scienco-Tekniko-Socio-Reto, kiu konsistas el interesigantoj pri rilatoj inter scienco, tekniko kaj socio. La eldonanto volas interkomuniki kun alilandanoj informojn kaj opiniojn pri nuntempaj gravaj sociaj problemoj. Reagoj estas tre bonvenaj. Adreso de la eldonanto: TANAKA Hiroaki, 2-26-15-103 Kashii, Higashi-ku, Fukuoka, 813 Japanio,

● La 17-an de decembro 1992 en la Muzika Akademio, Sofio, oni festis la 90-an jubileon de Prof. Stojan Stoev Ĝuĝev, mondfama bulgara folkloristo, honora membro de UEA kaj membro de Akademio de Esperanto. Oni substrekis, ke la multjaran sciencistan agadon de Prof. Ĝuĝev karakterizas du trajtoj: bulgara muzik-folkloro kaj Esperanto.

La emeritaj laborantoj de EPC-redakcio Li Shijun, Zhang Qicheng, Li Naixi kaj Zhang Zhongbi (de maldekstre) en la kunveno aranĝita lastatempe de la redakcio por festi ilian naskiĝtagon



Poŝtstampo kun portreto de F. V. Lorenz

● En la urbo Strážnice de Ĉeĥoslovakio (eksa), loka poŝtofiĉejo uzis, de la 14-a ĝis la 31-a de decembro 1992, afrankan maŝinstampilon kun la portreto de F. V. Lorenz, aŭtoro de la unua ĉeĥa lernolibro de Esperanto.

● En 1992 UEA eldonis du numerojn de Esperantodokumento.

N-ro 28-29E estas "Al nova internacia lingvopolitiko: La propeŝtita valoro de Esperanto" de Edward Symoens (Belgio). La aŭtoro prezentas fidindan materialon pri la eduka kaj instrua valoroj de Esperanto kaj pri ĉi-rilataj pedagogiaj eksperimentoj.

N-ro 30E estas "Perkomputila tradukado: La revo kaj la realo" de Dan Maxwell (Nederlando). Temas pri studo pri historio, problemaro kaj aktuala stato de perkomputila tradukado.





# Saĝa "trompisto"

**I**NTER la mongoloj vaste cirkulas rakontoj pri la saĝa Balagencang. Jene estas unu el la rakontoj.

Foje princo estis sur vojo. Li sidis en palankeno portata de ok homoj. Antaŭ li iris gardistoj kaj post li sekvis servistoj. La princo tenis gravan mienon. Li renkontis Balagencang.

"Kiu estas tiel aŭdaca, ke li ne cedas al mi la vojon nek genuas apude?" kriegis la princo pro kolero.

"Tiu estas la sentima Balagencang," respondis iu servisto.

"Jes, mi estas Balagencang," senhaste sin prezentis Balagencang. "Mi ne rekonis vin."

"Ha, ha, vi estas Balagencang!" diris la princo. "Mi aŭdis, ke vi estas trompema, ĉu?"

"Ne. Mi estas plej honesta."

"Oni diras, ke vi estas tre saĝa. Ĉu vi povas trompe elirigi min el la palankeno?" La princo ĝoje ridegis pensante, ke lia demando embarasas lin.

"Ne, mi ne kuraĝas tion fari. Kiel mi kuraĝus elirigi vin el la palankeno? Sed mi povos revenigi vin en la palankenon, se vi eliros."

"Ĉu vere?"

"Tio ne estas malfacila."

La princo pensis, ke se li ne eniros en la palankenon, Balagencang nenion povos fari. Kaj li tuj konsentis kun Balagencang kaj elpaŝis el la palankeno.

Apenaŭ la princo elpaŝis, Balagencang diris: "Via saĝa princa moŝto, ĉu mi ne elirigis vin trompe?"

La princo ekgapis de kolero. Li

enpaŝis en la palankenon kaj diris neniun vorton.

"Vidu, via saĝa princa moŝto, mi sukcesis elirigi vin el la palankeno, kaj nun mi revenigis vin enen sen artifiko."

La vizaĝo de la princo tordigis de kolero, kaj la servistoj ŝtele ekridis.

"Fi, vera trompisto. Ni foriru!" koleregis la princo.

"Haltu!" ekkriis Balagencang, apenaŭ oni levis la palankenon.

La princo tuj haltigis la portantojn por scii, kion volas Balagencang.

Sed Balagencang ridegis:

"Ha, kia obeema princo! Vi haltis tuj ĉe mia voko! Dankon."

Dirinte, Balagencang urĝis sian ĉevalon kaj kuris for. ■





# Diversstilaj konkursejoj

de ZHANG QINGZHEN

**P**OR la Olimpiaj Ludoj en 2000, kiujn Pekino petas gastigi, grandioza ĝenerala projekto de konstruaĵaroj el konkursejoj, loĝejoj, komercejoj kaj amuzejoj jam estas difinita, i.a. la plej atentiga estas la Olimpika Sport-urbo kun areo de 250 hektaroj en la norda antaŭurbo de Pekino. La sport-urbo konsistas el la jam konstruitaj Ŝtata Olimpika Sport-centro, la Sport-vilaĝo de la Azia Sportkunveno, komerca kvartalo, amuzaj instalaĵoj, loĝdomoj kaj la konstruitaj ĉefa olimpika stadiono kun 100 000 sidlokoj, ĝardenes-

ka olimpika vilaĝo, kiu povos loĝigi 20 000 homojn, kaj novaĵ-kaj videotransdonan centron kun areo de 120 000 kvadrataj metroj. Krom la jam konstruitaj 33 konkursejoj, konstruiĝos ankoraŭ 7 novaj konkursejoj en la urbaj kvartaloj aŭ en la antaŭurbo de Pekino. Tiuj novaj konstruaĵoj formas novan vidaĵon en la antikva Pekino, en kontrasto kun la Imperiestra Palaco, Ĉiela Altaro, Somera Palaco k.a.

## ĈINSTILA ARKITEKTURO


Ke domo estas aranĝita en la centro, ĉirkaŭita de ĝardeno, tio estas trajto de eksterlanda arki-

tekturo. La ĉina arkitekturo ĝenerale karakteriziĝas per tio, ke korto estas ĉirkaŭita de konstruaĵoj. La Sport-vilaĝo de la Azia Sportkunveno situas norde de la Kvara Rondŝoseo de Pekino. Ĝi konsistas el la Novaĵ-centro, Granda Kontinenta Hotelo kun 1 260 ĉambroj, dekelkaj loĝdomoj, Pekina Distra Centro kaj aĉet-centro, kiuj dislokiĝas en la ĉirkaŭaĵo, kun parko en la mezo. La dispozicio de la konstruaĵaro ja estas kortostila.

Ĉe la alia flanko de la rondŝoseo imponas la Ŝtata Olimpika Sport-centro. Ĝia arkitekturo similas al tiu de la sport-vilaĝo. Meze de ĝi kuŝas artefarita lago, ĉirkaŭe dislokiĝas la ĉefaj konkursejoj kunligitaj per pontoj kaj platformoj. Starante sur la platformoj oni povas ĝui la belan pejzaĝon kaj sperti la ĉinan ĝardeneskan pitoreskejon.

La harmonia aranĝo de diversaj konstruoj montras la apartajn trajtojn de la konkursejoj en la norda antaŭurbo de Pekino. Ili havas ĉiu sian apartan belon, kaj ankaŭ bonordecon en la tuto. Estas delikate projektitaj la vojoj, skulptaĵoj, fontanoj, vojmontriloj, peronoj kaj aliaj. Harmonio inter la konstruoj kaj verdaĵoj, inter la konstruaĵoj kaj medio faras la lokon tre plezura. Oni povas diri, ke ĝi estas "ĝardeno" en la norda antaŭurbo de Pekino. La diferenco kuŝas nur en tio, ke tiu

Trotuaro en la Ŝtata Olimpika Sport-centro





La Olimpika Sport-urbo

Foto de **WU XINHUA**

Infanoj sur la placo de la Ŝtata Olimpika Sport-centro

Foto de **WU XINHUA**





“ĝardeno” konsistas ĉefe el grandiozaj modernaj konstruoj, dum la tradicia ĉina ĝardeno el montoj, lagoj, rokoj, arboj kaj kioskoj.

## ORIGINALAJ FORMOJ KAJ MEDIO

La naĝejo kaj stadiono de la supre menciita olimpika sportcentro estas tre similaj unu al la alia en V-formo, kiel du pordoklapoj de la sportcentro. Oni konstruis tie dikajn kolonojn altajn je kelkdek metroj por teni la konkavajn tegmentojn. La proksima Granda Kontinenta Hotelo konsistas ankaŭ el du konstruaĵoj. La okcidenta domo en kvadrata formo aspektas normale kaj lakone. La arkforma orienta domo rigardas al la sudoriento kun konkava ekstero. La najbara Novaĵcentro estas zigzaga kaj Pekina Distra Centro — rombokonforma. Tiuj originalaj konstruaĵoj montras la modernan arkitekturon. La konstruaĵaro plejparte blanka kun bluaj fenestroj kaj pordoj estas tre eleganta sur la verda gazono ĉe blua lago.

Krom la menciita sportcentro en la norda antaŭurbo de Pekino, ankaŭ aliaj konkursejoj dislokiĝas en la urbaj kvartaloj. Ili en novaj konstrustiloj harmonias

kun la ĉirkaŭaj konstruaĵoj.

La Chaoyang-a Sporthalo funkcias kiel flugpilka konkursejo, situante ĉe angulo de vojkruciĝo. Ambaŭflanke de ĝi imponas aro da domturoj. Por mildigi la konflikton inter ĝi kaj la ĉirkaŭaj kvadrataj konstruaĵoj, la projektintoj elstarigis ĝian kurban konturon kaj malgrandigis ĝian alton kaj skalon. Dank’ al tio, la sporthalo harmonie staras en la malvasta loko.

La Shijingshan-a Sporthalo estas lukta konkursejo. Ĝi estas aviadilforma kun du flugiloj etenditaj. Ĉar la sporthalo situas en fundo de la basenforma loko, tio povas malpliigi la bruadon el ekstere kaj teni la halon en kvieteco kaj komforteco.

La aliaj sporthaloj ĉiu havas sian apartan stilon, laŭ la malsamaj cirkonstancoj kaj bezonoj. La Studenta Sporthalo estas kvadrata kun kvar anguloj inkrustitaj per okangula kolono. La dikaj blankaj tegmentrandoj kaj la kolonoj havas nacistilajn N-formoj, kio impresas intime la sportistojn kaj spektantojn. La sesangula Sporthalo de Tera Altaro kun tradiciaj duklinaj tegmentoj estas harmonia kun la proksimaj antikvaj konstruaĵoj en la parko. La

akvo-sportejo de Pinggu-gubernio proksima al Pekino, tegmentita per ruĝaj tegoloj horizontale aranĝitaj, harmonias kun la verdaj montoj kaj blua akvo. La mara sportejo en Qinhuangdao (Ĉinhuangdaŭ) de Hebei-provinco, oriente de Pekino, aspektas kiel ŝipo.


## MULTFUNKCIAJ KONKURSEJOJ

La konkursejoj rompis la malnovajn rutinojn kaj prenis mezuron de manpilka ludkampo kiel sian bazan mezuron anstataŭ tiun de korbopilka ludkampo. Ili povas ne nur funkcii kiel ludkampo de korbopilko, flugpilko, volano, manpilko kaj piedpilko, sed ankaŭ funkcii kiel amuzejo, kunvenejo kaj ekspoziciejo. En ili servas restoracio, kafejo, dancejo, amuzejo, kegloludejo, dormoĉambroj ktp.

En la Studenta Sporthalo du trionoj de la sidlokoj estas moveblaj. En la ordinaraj tagoj ĝia konkursejo povas funkcii kiel tri korbopilka ludkampoj por trejnado. Se oni translokas la moveblajn seĝojn de du etaĝoj, do tie aperas du trejnejoj, kie oni povas ludi tablotenison, volanon, skermadon ktp. En la ripozhaloj oni povas fari trejnadon de ĉevalsalto, skermado k.a. La Sporthalo de la Tera Altaro funkcias ne nur kiel konkursejo, artprezentejo kaj kunvenejo, sed ankaŭ kiel cirko. En ĝia subtera etaĝo estas kegloludejo, bufedejo, kafejo, te-trinkejo kaj 36 apartamentoj. Krome, en multaj sporthaloj funkcias ankaŭ ŝtuparlifto, tualetejo kaj aliaj instalaĵoj por handikapuloj. En la sporthaloj de la norda antaŭurbo estas diversaj instalaĵoj por konkursoj de handikapuloj-sportistoj.

Krom la konkursejoj, kiuj sukcese ludis sian rolon en la 11-a Azia Sportkunveno en 1990, ĉinaj konstruistoj entuziasme prenas sur sin la preparan laboron por konstrui novajn grandiozajn konkursejojn. ■

La Sporthalo Yuetan en Pekino



# Al diverseco de laŭsezonaj vestoj

de ZHANG QINGZHEN

**P**RES-  
K A Ŭ  
ĉiuj, kiuj  
revizitis  
Pekinon  
en la lastaj jaroj,  
diris, ke tie oka-  
zis granda ŝanĝi-  
ĝo. Krom la mul-  
tiĝo de loĝejoj kaj  
instalaĵoj por trafi-  
ko kaj turismo, ili  
vidis ankaŭ la ŝan-  
ĝigon de vestoj,  
precipe tiun de  
laŭsezonaj vestoj  
por virinoj kaj in-  
fanoj, kiuj distin-  
giĝis per diverseco  
de fasonoj kaj ko-  
loroj.



Familio sur placo

Adiaŭinte la severan vintron, anstataŭ dikaj kaj simplaj vestoj oni portas multifasonajn kaj freŝkolorajn. En ĉi printempo kaj somero la vestoj por virinoj de Pekino des pli enmodiĝis ol iam antaŭe kaj karakteriziĝas per la jeno:

I. Pli da senĝeneco. En la frua printempo, kiam pekinanoj ankoraŭ portis vintrajn vestojn, sentimaj junulinoj jam vestiĝis per printempaj freŝkoloraj vestoj. Iuj el ili, en helkolora jupo, strikta pantalono kaj brilaj pikkalkanumaj botoj, iris sur strato aŭ vizitis magazenon kaj balon; II. Komforto. Por tio oni portis blankajn turismajn ŝuojn, okcidentan veston aŭ jakon kaj ankaŭ striktan veston. En tiaj vestoj oni sentis sin libera kaj senĝena, ĉu en veturado, ĉu en piedirado; III. Eleganteo el modesteco. Oni portis reformitajn laborvestojn. La okulplaĉaj vestoj diferencis de la antaŭaj simplaj laborvestoj per fasono kaj koloro. Tiaj laborvestoj estas ŝatataj ne nur de laboristinoj, sed ankaŭ de aliaj virinoj.

Nuntempe oni emas al natureco. Tio montriĝas ĉefe en koloro, fasono, strukturo kaj kvalito de vesto. Lastatempe oni ŝatas vestojn el supraj kaj elastaj materialoj en koloroj verda, kacia,

blua kaj ĉielruĝa de la naturo. La vestoj por virinoj, kiuj similis al tiuj por viroj estas anstataŭigitaj per la vestoj reliefigantaj la korpajn liniojn de virinoj.

La vestoj por infanoj estas fasonitaj pli pimpe por montri ilian vigecon.

La vestoj por viroj enkorpigas ilian virecon, elegantecon kaj senĝenecan, ekz. sporto-vestoj, jakoj, strik-

taj vestoj kaj malhelkolora aŭ oranĝa mantelo kun mildakolora koltuko.

Kompreneble, la reformado de fasonoj strikte rilatas kun la kresko de enspezo de loĝantoj. Dank' al la pliboniĝo de la materia vivo, oni renovigis siajn konsumajn konceptojn kaj havas fortan emon al la lukso kaj diverseco de konsumo, kio stimulas projektantojn kaj produktantojn de vestoj al la novaj ŝanĝiĝoj. El tio rezultas, ke la vesta merkato plivigliĝas kaj pli kaj pli multaj homoj portas modajn vestojn.

Por kontentigi la bezonon de konsumantoj, sennombraj magazenoj kaj butikoj de laŭmodaj vestoj aperis en urboj kaj vilaĝoj. Sur la plej movoplana strato Wangfujing (Ŭangfuĝing) de Pekino funkcias kelkdek magazenoj kaj butikoj, el kiuj nur kelkaj ne vendas vestojn. En ili granddebite vendiĝas vestoj el kotono, lano, silko k.a.

Krome, aperis unuj post aliaj ankaŭ butikoj de vestoj ambaŭflanke de stratoj, kiuj alportis ankoraŭ pli da viveco al la urba kaj vilaĝa merkatoj. ■



Junulinoj sur strato



## SUR STRATOJ

# Stratoj en printempo

Persikarboj ĉe strato







Manekenoj antaŭ magazeno

Fotoj de DA WEI


Fiŝokado



En printempo

CHEN SI:

# Moderna ĉina dancarto



**L**A 20-a jarcento estas epoko de danca revolucio. Je la fino de la 20-aj jaroj Isadora Duncan kaj Loos S. Denis, pioniroj de modernaj dancoj kun ribela spirito, liberigis la dancarton de difinita tekniko. Ekde tiam senĉese viglis la dancomondo pro tio, ke dum la pasintaj 60 jaroj aperis multaj modernaj eminentuloj kaj majstroj, kiuj ŝanĝis la dancarton de ĝuo speciale por la nobeloj en metodon rekte montri la homan deziron por arto, tiel ke la antaŭa eksplika dancarto fariĝis moderna kreiva arto. Modernaj dancoj kun liberaj ritmo kaj movoj okupis la scenon, dum la klasika baletto perdis la monopolan lokon. La klasika baletto mem transformiĝis en modernan baleton. Dancarto fariĝis unu el la plej gravaj artoj en la 20-a jarcento, kiu troviĝas en diversaj formoj en la homa socio.

## KULTURI LA DEZERTON

La ĉina dancarto prosperis en la dinastioj Tang kaj Song (618-1279). Poste ĝi sin kaŝis inter la ĉinaj operoj. Tial, kiam okazis la danca revolucio en Eŭropo

en la 20-a jarcento kaj klasikaj eŭropaj baletistoj ekdancis modernan dancon sur la piedpintoj, la ĉina danca scenejo ankoraŭ estis dezerto. Dum la 30-aj kaj 40-aj jaroj Wu Xiaobang (U Ŝjaŭbang) kaj Dai Ailian, pioniroj de modernaj ĉinaj dancoj, diligente ekkulturis la dezerton.

De la komenco de la 50-aj jaroj ĝis la mezo de la 60-aj jaroj konstruiĝis en Ĉinio danca sistemo, kiu preskaŭ estis kopio de tiu de

Sovetio. Laŭ la sistemo de eŭropaj klasikaj baletoj oni kompilis lernolibrojn pri ĉinaj klasikaj dancoj surbaze de ĉinaj operoj, starigis lernejojn por kulturaj fakaj dancistoj kaj organizis kanto-dancajn ensemblojn tra la tuta lando. La moderna ĉina dancarto iom post iom disvolviĝis kaj sursceniĝis nemalmultaj dancoj ŝatataj de popoloj, ekz. la dancoj "Ruĝa Rubando", "Lotuso", "Pafarko" kaj baletoj "Socie-

Sceno el la Palaca Danco de Qing-dinastio



to de Malgranda Glavo” kaj “Lotus-lanterno”. Ili montris, ke la moderna ĉina dancarto disvolviĝis al sia unua kulmino kaj eniris en sian infanecon naivan kaj revoplenan.

## DEPRESIO KAJ REPROSPERO

De la mezo de la 60-aj jaroj ĝis la mezo de la 70-aj jaroj Ĉinio travivis la kulturan revolucion. La danca rondo depresiis kaj dancoj kun nacia gusto malaperis de sur la scenejo. Tiam troviĝis nur modernaj baletoj, adaptaĵoj de revoluciaj rakontoj, kiel “Ruĝa Virina Taĉmento” kaj “Blankhara Knabino”. Kvankam ili spegulis la modernan ĉinan vivon per moderna baletoj, tamen ili apenaŭ havis influon sur la moderna ĉina danco pro manko de arta polurado kaj profunda kultura bazo.

Ekde la 80-aj jaroj Ĉinio malfermis sian pardonon al la mondo kaj komencis lerni dancojn diverslandajn, diversskolajn kaj diversstilajn. Dank’ al tio la ĉina dancarto ekfloris.

“Sur la Silka Vojo” estis la unua baletoj en la 80-aj jaroj, kun nacia gusto kaj moderna spirito. Tiu baletoj temas pri la legendoj kaj rakontoj okazintaj sur la Silka

Vojo en okcidenta Ĉinio en Tang-dinastio (618-907). Oni donis atenton ne nur al la tradicia ĉina dancarto, sed ankaŭ al la figuro kaj kostumo de la roloj. Prenante la figurojn sur freskoj en la budha kaverno de Dunhuang, fama antikva arta trezoro de Ĉinio en Tang-dinastio, kiel modelon kaj portante klasikan kostumon riĉan je nacia koloro, la dancistoj montris per sia kreivo kaj imago ne nur la antikvan kulturon de la ĉina nacio kaj popolajn morojn de okcidenta Ĉinio, sed ankaŭ la modernan artan spiriton. La prezentado de “Sur la Silka Vojo” faris sensacion en iuj landoj de Azio kaj Eŭropo. Ĝi estis rigardata kiel reprosperiĝo de la ĉina nacia danco. Poste naskiĝis multaj naciaj baletoj, ekz. “Moroj de Tang- kaj Song-dinastioj”, “Dancoj Akompanataj de Gamsonorilaro” kaj “Palaca Danco de Qing-dinastio”, kiuj spegulis la tradicion ĉinan kulturon kaj ĝuigis tradiciajn ĉinajn dancojn nekonatajn dum centoj da jaroj.

En tiu periodo ĉinaj dancistoj analizis diversnaciajn kaj diverslokajn popolajn dancojn per moderna teorio kaj kreis multajn modernajn dancojn riĉajn je lokaj koloroj. En “Danco de Bronza

Tamburo” de ĝuang-nacio oni dancis sub muziko de bronza tamburo por esprimi sian adoron al la suno. Akompanate de tamburado la dancistoj sursceniĝis en pozo de rano. La tambura muziko estas primitiva kaj ritma, kaj la paŝoj de la dancistoj pasie fortaj, kio bone manifestis la karakteron de la ĝuang-oj ardan kiel la suno. Krome, “Popolaj Dancoj de Ĉinio”, “Ĉe la Flava Rivero”, “Amo de Gefiloj de la Flava Rivero” kaj “Sub Lunarko”, kiuj jam estis konigitaj en nia gazeto, ĉiuj montris la modernan ĉinan dancarton kun nacia kaj loka gusto.


Disvolviĝis kaj maturiĝis la moderna ĉina dancarto. Aperis elstaraj junaj dancistinoj kiel Yang Liping kaj Ding Jie (Ding Ĝje). Per siaj talento kaj nekomparebla dancokapablo ili havigis al siaj dancoj apartan ĉarmon. Yang Liping devenis de la Xishuangbanna-a Taj-nacia Aŭtonoma Subprovinco de Yunnan. Ŝi kunfandis tajan pavo-dancon kun moderna eŭropa danco kaj kreis gracion, originalan pavodancon. Ŝi fariĝis brila stelo en la dancista rondo de Ĉinio.

## RETRORIGARDO KAJ ESTONTECO

La ĉina dancarto aperis en Zhou-dinastio (11-a jarcento — 256 a.K.). Tiam jam ekzistis danco por kulto kaj amuzo. En Qin-dinastio (221-206 a.K.) la ĉina danco evoluis. Historio notis, ke en Qin-kortego oni prezentis dancojn por montri la bravecon de generaloj kaj soldatoj. En Tang-dinastio la ĉina danco prosperis. Troviĝas figuroj de dancistoj kaj dancoscenoj sur freskoj de budhaj kavernoj de Dunhuang.

La ĉina dancarto ensorbis sukcon de tradicia kaj loka dancarto kaj lernis la mondan avangardan dancan teorion. Oni esperas, ke la moderna ĉina dancarto atingos pli altan nivelon kaj okupos lokon en la monda dancista rondo. ■


Ventumila danco






# *Dancoj de naciminoritatoj*

Fotoj de YAN JIN



Sceno el la uigura danco "Ĝojo"


Sceno el la jaŭ-a danco "Festa Tamburado"





Sceno el la li-a danco "Rizpistado"

Sceno el la mongola danco  
"Paštisto"



Sceno el la ji-a danco "En Luna Nokto"



## EL ĈINAJ GAZETOJ

### SCIENCISTINOJ EN LA ĈINA ALT-TEKNIKA KAMPO

Statistiko diris, ke en 1988 Ĉinio havis 2.969 milionojn da sciencistinoj, kiuj konsistigis 30.6% de la totala nombro de sciencistoj, kaj en 1989 la proporcio kreskis al 35%.

En 1990 inter la fakaj respondeculoj de la Ŝtata Scienca kaj Teknika Komisiono de Ĉinio la sciencistinoj konsistigis 42% kaj multaj el ili laboris kiel gvidantoj. En ĉ. 1 000 altaj lernejoj, institutoj kaj fakoj por nacidefenda scienc-esplorado estas almenaŭ 100 000 profesorinoj, esploristinoj, superaj inĝenierinoj, akademianinoj kaj studentinoj por doktoriĝo aŭ magistriĝo.

De 1985 ĝis 1989 1 663 sciencistinoj gajnis la premion de ŝtata scienc-teknika progreso.

De la lastaj dek jaroj ĉiam plimultiĝas ĉinaj sciencistinoj. Ĉinio havas pli ol 3 000 doktorinojn. En la Ĉina Akademio de Sciencoj pli ol 300 sciencistinoj ricevis altan profesion titolon. En la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj la sciencistinoj konsistigas 40% de la sciencistoj honoritaj per alta profesia titolo. En la lastaj jaroj 152 fakulinoj fariĝis ŝtatnivela sciencistinoj.

En la Satelit-lanĉa Centro de Yichang, Ĉinio, estas 200 sciencistinoj. 85% el ili laboras super kosmonaŭtika eksperimento kaj fariĝis ĉefa laborforto tiuflanke. En la Ĉina Instituto pri Transporta Raketo laboras 2 389 sciencistinoj, kiuj konsistigas 33.6% de la totala nombro.

### RAPIDA DISVOLVIĜO DE LA SATELITA TEKNIKO DE ĈINIO

La satelita afero de Ĉinio antaŭeniras grandpaŝe. En la Oka Kvinjara Plano de Ĉinio serio da satelitoj kun alta funkcio estos lanĉita.

Koncernaj aŭtoritatoj diris, ke Ĉinio provfaras disaŭdigan telekomunikatan sateliton de nova generacio. La kapacito kaj uztempo de la satelito atingos la nivelon de tiuj de la evoluintaj landoj aŭ proksimiĝos al ĝi. Kaj la unuapaŝa sukceso estas atingita en la provfarado de novtipa meteobserva satelito fiksota super Ĉinio unufoje per tekniko de senmova orbito.

Samtempe kun tio, la esplorado de novtipa riĉfonta satelito iris en ŝlosilan periodon. Tia satelito donos modernajn rimedojn fari ĝeneralan esploron kaj prospektoradon de ĉinaj riĉfontoj. Nun estas gajnita granda sukceso en es-

plorado pri funkcioj de scienc-esplora kaj teknik-eksperimenta satelitoj.

De post aprilo 1970, kiam Ĉinio lanĉis la unuan artefaritan sateliton, ĝi jam sukcesis lanĉi 32 satelitojn en la tipoj disaŭdiga kaj telekomunika, praktika, meteorologia kaj reprena, kaj en du fojoj sendis po tri satelitojn ĉielen per unu raketo. Iuj satelitoj plenumis sian taskon kaj reflugis teren, dum la aliaj ankoraŭ flugas en la ĉielo.

La satelitoj de Ĉinio posedas fidindan funkcion. La projekto kaj teknikoj por repreni sateliton, lanĉi plurajn satelitojn per unu raketo kaj fiksi sateliton sur sinkrona orbito jam atingis la avangardan nivelon de la mondo.

Krom servigi satelitojn al nacidefendo, mapado, prospektorado de riĉfontoj, prognozado de vetero, disaŭdigo, edukado, telekomuniko kaj aliaj branĉoj, Ĉinio ankaŭ kunlaboras kun aliaj landoj en ekspluatado de kosmospaco. Ĝi faris eksperimenton pri satelit-kunporto por Germanio kaj Francio kaj per tio malfermis la pordon al la internacia merkato por la tekniko de ĉina satelito.

### KLASIKAJ ĈINAJ LIBROJ EN ALIAJ LANDOJ

En la lastaj jaroj klasikaj ĉinaj libroj estis alte taksataj de multaj landoj. La unua traduko de la infana lernolibro Sanzijing (Sanzijing) estis eldonita de la Eduka Eldonejo de Singapuro en oktobro 1990 kaj listigita kiel unu el la eksponataj libroj en la Libro-Foiro de Frankfurto okazanta en la fino de la monato. En tiu jaro ĝi estis elektita de Unesko kiel unu el la "Libraro pri la Moralo de Infanoj".

"Militartoj de Sun Zi" estas vaste konata en multaj landoj kaj regionoj. Nun la libro estas tradukita en la japanan, francan, rusan, germanan kaj aliajn 10 lingvojn. "Yijing" (Jijing) estas unu el la aŭguraj libroj de la antikva Ĉinio. De 1985 la libro estas tradukita en 24 lingvojn.

Ankaŭ klasikaj medicinaj libroj de Ĉinio estas bonvenaj al aliaj landoj. En iuj sudorient-aziaj landoj, surbaze de la teorioj traktitaj de la antikva ĉina medicinisto Zhang Zhongjing (Ĝang Gongjing) en lia libro Pri Simptomoj de Tifo, oni starigis sian propran ĉin-medicinan sistemon. En Germanio oni prenas klasikajn ĉinajn medicinajn librojn kiel referencajn librojn legendajn por kandidatoj por doktoreco.





Gardeno en la loĝejo

# En la granda antikva loĝejo de la familio Qiao

Teksto de LI QIANG

Fotoj de YAN JIN

tas el du kvadrataj kortetoj, kie sidas la Folkloro Muzeo. Ĉiuj ĉambroj en ili estas bone aranĝitaj por prezenti la kultadon, funebran kaj edziĝan ceremoniojn, celebradon de festo kaj ĉiutagan vivon de la loĝantoj en meza Shanxi-provinco dum la periodo de Qing-dinastio ĝis nun. En la muzeo estas eksponataj kostumoj, koloraj porcelanaĵoj, lignaj mebloj, antikvaj moneroj kaj butikaj ŝildoj.

Dum la vizitado, mia ĉiĉerono rakontis al mi la historion de la familio. Ĝi estis povra. Poste Qiao Guifa fariĝis estro de la familio. Liaj gepatroj mortis antaŭ longe. Li vivis malfacilan vivon. Poste li riĉiĝis per vendo de toŭfuoj. 40-jara, Qiao Guifa edziĝis kaj konstruis sian unuan loĝejon en Qiaojiabu. Li bone sciis kiel teni la vivon kaj donis kvin malpermesojn al siaj gefiloj: malpermeso fumi opion, malpermeso havi kromedzinon, malpermeso viziti bordelon, malpermeso hazardludi kaj malpermeso drinki. Tial pli kaj pli riĉiĝis la familio, kiu faris komercon en Pekino, Tianjin (Tjanĝin), Ŝanhajo, Yunnan, Guizhou (Gujĝoŭ) kaj Sichuan. Ĝi havis kompaniojn eĉ en Rusio, Mongolio, Japanio kaj Koreio. La ĉefaj konstruaĵoj de la loĝejo estis finitaj en tiu tempo.

La loĝejo de la familio Qiao tenas la trajtojn de la tradicia kvadrata korto de norda Ĉinio. Ĝin ĉirkaŭas brikmuro alta je 11 m, sur kiu estas kreneloj kaj gvatturoj. La loĝejo kovras ĉ. 9 000 kvadratajn metrojn, kun plankareo de 4 000 kvadrataj metroj, kaj havas ses kortojn el 20 kortetoj kaj 313 ĉambroj.

La loĝejo de la familio Qiao karakteriziĝas aparte per tio, ke brika vojeto interligas ĉiujn tegmentojn de la domoj, kaj en ĝi estas multaj ŝtuparoj por supreniri al tegmentoj kaj atingi ĉiujn kortetojn per la vojeto. Permesite, mi surgrimpis tegmenton. Ĉirkaŭen rigardante, mi trovis, ke la loĝejo estas sufiĉe granda, precipe la nordaj du etaĝdomoj aspektas majeste. Sur la tegmentoj lokiĝas dometoj kun diversformaj fumtubo-

Nun la loĝejo allogas al si pli kaj pli multajn en- kaj eksterlandajn turistojn. ■

**E**N la gubernio Qixian (Ĉjiŝjan) de Shanxi(Ŝanŝji)-provinco troviĝas la granda loĝejo de la familio Qiao, tipa antikva loĝejo de norda Ĉinio. Nun ĝi estas la sidejo de la Folkloro Muzeo de la gubernio.

Enpaŝinte en Qiaojiabu(Ĉjaŭĝjabu)-vilaĝon de la gubernio, vi povas vidi altajn ĉirkaŭmuron kaj pardon kun alero. La lasta vizaĝas al ekranmuro kun brika gravuraĵo. La loĝejo konstruiĝis en Qing-dinastio (1644-1911 p.K.) kaj estas bone konservata nun.

Ĉe la pordo de la loĝejo ŝtona vojo kondukas enen, de oriente okcidenten. Ĝi larĝas je sep m kaj longas je 80 m. Ĉe la fino de ĝi staras la templo de la prapatroj de la familio. Ambaŭflanke de la vojo viciĝas po tri kortopordoj. Interne de la unuaj du nordaj pordoj estas du kortoj similaj unu al la alia. Po paro da grandaj ruĝaj lanternoj pendas antaŭ la pordoj. Ĉiu korto konsistas el tri kortetoj. La interna kaj ekstera kortoj interkomunikiĝas per koridoro. Interne de la tria pordo norde de la ŝtona vojo kuŝas ĝardeno kun artefarita monteto, baseno, kiosko kaj pavilono.

Ĉiu el la tri kortoj sude de la ŝtona vojo konsis-



Pordo kun alero

Korto en la loĝejo



Salono destinita por festi la naskiĝtagon de maljunuloj de la familio





# Koloraj modlaĵoj de Fengxiang

Teksto kaj fotoj de LI QIANG



Leono



Tigroj

Bovo





**K**OLORAJ argilaj modlaĵoj estas popularaj metiartaĵoj. Tiuj faritaj en Fengxiang de Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco estas famaj en la Nordokcidento de Ĉinio pro siaj bela formo, delikata pentrado kaj fortaj lokaj trajtoj.

Ili originas el la cent-familia vilaĝo Liudaoying, sudoriente de la gubernia urbo Fengxiang. Tie preskaŭ ĉiu familio sin okupas pri modlado de argilaj ludiloj. Enkortiĝinte, oni kvazaŭ eniris en modlajan mondon. Sur tablo, planko, terlito kaj fenestrobretoj ĉie vidiĝas koloraj modlaĵoj: Leonoj kun alte tenata kapo kaj larĝe malfermitaj okuloj, imponaj tigroj, viglaj ranoj, hundidoj kaj beboj, fortikaj kuŝantaj bovoj kaj diversaj figuroj en la mitoj. Ili ĉiuj estas versimilaj kaj amindaj.

En la vilaĝo la modlado de argilaj ludiloj jam havas historion de 600 jaroj. Oni diras, ke en la komencaj jaroj de Ming-dinastio (1368-1644) por terkulturado la imperiestro ordonis tie garnizonigi soldatojn, kiuj, deveninte de Jingdezhen (Ĝingdeĝen), urbo de ceramikaĵoj en Jiangxi (Ĝjangŝji)-provinco, estis kapablaj en produktado de ceramikaĵoj. En la postlaboraj horoj ili faris argilajn ludilojn por donaci aŭ vendi. Tiamaniere formiĝis iom post iom la arto de koloraj modlaĵoj propra al Fengxiang. Kutime oni faris la metiartaĵojn en sia hejmo. En ĉiu vintro babilante ĉe kameno aŭ sur terlito, la familianoj modlis kaj kolorigis argilajn ludilojn. En festotago aŭ foiro oni do vendis ilin. Iam oni ankaŭ kolportis ilin.

En la pasintaj 600 jaroj tiu metiarto herediĝis de generacio al generacio. Ĝi disvolviĝis kun la socia progreso sur la tradicia bazo kaj ĝia arto pli kaj pli perfektigis. La koloraj modlaĵoj de Fengxiang povas dividiĝi en du partojn, t.e. argilajn ludilojn kaj ornamaĵojn, kiuj temas pri birdoj kaj bestoj, kaj ankaŭ pri fabeloj kaj vilaĝa vivo. Oni ornamas per ili muron

aŭ tablon. Iliaj tradiciaj modlaĵoj havas pli ol cent specojn. Ni ekzemplas tion per leonoj. Tie estas leonoj staraj, kaŭrantaj, leonoj kun alte tenata aŭ klinita kapo, kun larĝe malfermita buŝo kaj elmontritaj dentoj. Per hiperbolaj esprimoj la artistoj faris leonojn ne nur viglaj kaj ferocaj, sed ankaŭ amindaj.

En la vilaĝo Liudaoying oni faras la kolorajn modlaĵojn per simplaj metodoj. Ili unue muldas figuron per moligita materialo el argilo kaj paperpasto. Post hardiĝo de la figuro oni ĝin poluras kaj blankigas kaj faras desegnon sur ĝi per ruĝa, verda kaj flava koloroj kaj fine polituras la indikitajn lokojn. Tiamaniere oni ricevas tre belajn ludilojn.

El la grandnombraj koloraj modlaĵoj de Fengxiang la plej originalaj estas tigroformaj pendaĵoj, similaj al reliefaĵoj. Ĝenerale oni pendigas ilin sur muro. La plej malgranda tigroforma pendaĵo estas malpli-ol-10-centimetra kaj la plej granda proksimume

unu-metra. Al la oreloj, nazo kaj vangoj de la tigro oni kroĉas malgrandajn ornamaĵojn, kiaj peonio, emblemo de riĉeco; granato, emblemo de grandnombraj posteuloj; citrono kaj persiko, emblemoj de feliĉo kaj longa vivo. Ili plene montras la amon de la produktantoj al la vivo, la kutimojn, morojn kaj tradiciajn kulturajn konceptojn de la vilaĝo.

En Fengxiang la tigroforma pendaĵo estas rigardata ne nur kiel ornamaĵo, sed ankaŭ kiel amuleto. En Fengxiang oni observas la moron, ke en la tago de unumonatiĝo kaj naskiĝtago de bebo, la avino kaj onklo devas donaci al ĝi tigroforman pendaĵon, kiel emblemon de feliĉo kaj amuleton. Oni ligas la sorton de la bebo kun la pendaĵo, dezirante, ke la tigra dio garantiu al la bebo sanan kreskon. El tio vidiĝas, ke la modlarto profunde enradikiĝis en la loko. Ĝi spegulas ankaŭ la fortan nacian spiriton kaj bonan deziron de la popolo. ■

## ABONTARIFO DE EPĈ

Lando	Valuto	1 Jaro	Sendokosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	18.70	16.00	34.70
Aŭstrio	ATS	192	128	320
Belgio	BEF	575.00	375.00	950.00
Germanio	DEM	27.30	18.20	45.50
Britio	GBP	9.20	6.30	15.50
Finnlando	FIM	61.40	49.60	111.00
Francio	FRF	88.00	62.00	150.00
Italio	ITL	20200	13800	34000
Nederlando	NLG	27.50	23.50	51.00
Nov-Zelando	NZD	25.60	22.00	47.60
Svisio	CHF	23.00	16.50	39.50
Usono	USD	14.00	12.00	26.00
Kanado	CAD	16.80	14.40	31.20
Japanio	JPY			4140
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	USD	14.00	12.00	26.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko, Latin-Ameriko, Orient-Eŭropo kaj Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj:				
	USD			14.40



Forsto ĉe dezerto

## VERDIGO EN ĈINIO

# Granda verda muro en norda Ĉinio

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de WU XINHUA

**L**A sistemo de la kampoŝirma forstozono estas granda mediprotekta konstruo en nordokcidenta, norda kaj nordorienta Ĉinio (mallongigo: la regiono Tri Nordoj). Post 15-jara penado de ĉinoj tiu verda kurteno jam havas rudimentan formon kaj zigzagas kiel granda muro en la norda parto de Ĉinio.

### RUDIMENTA FORMO DE LA GRANDA VERDA MURO

Iam estis tre malekvilibra la ekologio en la regiono Tri Nordoj. Grandareaj arbaroj kaj ste-

poj fariĝis dezertoj. Tie aperis Taklimakan, Tenger, Muus kaj aliaj naŭ dezertoj, kun sabloventata linio longa je 7 000 kilometroj de oriento al okcidento.

Historia libro diras, ke antaŭ tre longe, en la regiono kreskis densaj arbaroj kaj etendiĝis fekundaj stepoj. Tamen pro la detruado de militoj kaj senbrida hakado de arboj, malgrandiĝis la vasta Stepo de Interna Mongolio kaj la verdejoj en Xinjiang (Ŝingĵang) kaj eroziigis la fekunda tero de la Leŭsa Altbenaĵo. Estis atakataj de sablovento ankaŭ la Nordorienta

Ebenaĵo, grenproduktejo de Ĉinio, kaj Pekino.

Kontraŭ la severa puno fare de la naturo, en 1978 la ĉina registaro decidis konstrui kampoŝirman forstozonon en la regiono kun longo de pli ol 7 000 kilometroj, larĝo de 400-1700 kilometroj kaj totala areo de 4.069 milionoj da kvadrataj kilometroj. La forstozono komenciĝas oriente de Binxian-gubernio, Heilongjiang(-Hejlongĝjang)-provinco, kaj finiĝas okcidente ĉe Uzbel-monto de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Ĝi trairas 551



Forsto ŝirmanta vilaĝojn kaj kampojn kontraŭ sablo

Forsto inter dezerto kaj kampoj





guberniojn de 13 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. Ĝia areo egalas al 42.9% de la teritorio de Ĉinio. Farinte la decidon, la ĉina registaro sendis ekologistojn, forstokulturistojn kaj alifakajn sciencistojn fari esploron en la regiono Tri Nordoj, ellaboris la ĝeneralan projekton pri la kampoŝirma forstozono en la regiono kaj prenis ĝin kiel unu el la gravaj konstruoj de la ŝtato.

La verdiga revolucio, kiu komenciĝas por ŝanĝi la ekologian medion de la regiono, celas konstrui mediprotektan sistemon kun lignecaj plantoj kiel la ĉefaj, prenante ekologion kiel teorion bazon kaj sisteman inĝenierion kiel rimedon. La konstruado finiĝos espereble en la jaro 2050. Laŭ plano, tiam la areo de forsto atingos 35 milionojn da hektaroj. La forstumado estas farata ĉefe en la 12 dezertoj de la regiono Tri Nordoj kaj en la regiono sur la Leŭsa Altebenaĵo, kie grundo serioze eroziigis. Kadre de pli ol 390 gubernioj de tiu arbarizota regiono, krom bone protekti la tieajn arbarojn kaj stepojn, oni devas kulturi ankaŭ multajn novajn forstojn, por protekti kampojn, paŝtejojn kaj akvofontojn kaj produkti lignon. Dum forstumado oni plantas arbojn, arbedojn kaj herbojn kune.

## UNUAPAŜA EFIKO

Fakuloj konstatis, ke la unuaperioda forstumado de la kampoŝirma forstozono (1978-1985) atingis la deziratan celon, kaj pliboniĝis la ekologia medio de triono de la regiono.

Nun la pli granda duaperioda forstumado (1986-1995) iras jam de pli ol sep jaroj. La ĉefa tasko estas verdigi la regionon ĉirkaŭ Pekino kaj Tianjin (Tjanĝin), arbarizi la dezertojn Muus kaj Korĉin kaj kulturi kampoŝirmajn forstojn ĉe la fervojo Pekino-Baotou (Baŭtoŭ)-Lanzhou (Langŭoŭ) kaj la bordoj



Dank' al forsto la fervojo bone funkcias.

de la Flava Rivero.

Ĝis 1992 la mediprotekta konstruo en la regiono Tri Nordoj jam akiris ĝojigan sukceson. La arbarizita areo atingis 210 milionojn da muoj (15 muoj = 1 hektaro) kaj la nombro de la plantitaj arboj estis tri miliardoj. La areo, konsistiganta pli ol 30% de la regiono sur la Leŭsa Altebenaĵo, kie eroziigis grundo, estas arbarizita pli-malpli. Tie la forsta areo pliiĝis je 540 000 hektaroj kaj la areo kovrita de vegetaloj kreskis de 12.3% en 1977 al 20.6% kaj la sablo enfluanta en la Flavan Riveron malmultiĝis je 10%.

Ĉe la sabloventa linio la areo de la forstoj kaj naturaj arbaroj jam atingis 190 milionojn da muoj. En ĉ. du trionoj de la regiono malfortiĝis la atako de sablovento. En parto de la regiono la sablovento estas bridita. Antaŭe en la regiono Yulin, Shaanxi(-Ŝenŝji)-provinco, ĉe la suda rando de la dezerto Muus la dezerta areo estis 24 400 kvadrataj kilometroj, kiuj konsistigis 56.7% de la regiono. Nun interne de la norda dezerto kreskas pli ol 100

pecoj da forstoj, ĉiu kun areo de pli ol 10 000 muoj, kaj per tio estas fiksitaj 8.6 milionoj da muoj da flusablo kaj duonfiksitaj 4.5 milionoj da muoj. La areo kovrita de arbaro de la urbo kreskis de 0.1% al 29.9%. La disvolviĝo de la kulturado de fruktaroj kaj herboj kaj brutobredado faris la antaŭan dezerton riĉa oazo.

La dezerto Muus en la Interna Mongolio, kun areo de 120 milionoj da muoj, estas unu el la kvar plej malfacile arbarizeblaj dezertoj en Ĉinio. Antaŭ 1977 tie kreskis nur maldensa forsto, sed nun tie kreskas ĉ. dek miliardoj da arboj, kiuj kovras 16.1% de la dezerto. En la pasinteco la regiono Zhangjiakou (Ĝangĝjakoŭ), nordokcidente de Pekino, estis atakata de sablovento en printempo kaj vintro, tamen nun tie etendiĝas kampoŝirmaj forstoj vico post vico. La verdigo plibonigas ekologian medion, ke la sablovento ne plu forte atakas Pekinon. Laŭ statistiko, en la 70-aj jaroj ĉiujare en Pekino estis 25.5 tagoj de sablovento, tamen nun 12.5 tiaj tagoj.

Nun arboretoj protektas 165 milionojn da muoj da kampoj en la ĉefa grenproduktejo de la regiono Tri Nordoj kaj rimarkinde mildiĝis la loka klimato. Oni diris, ke la kampoŝirmaj forstoj pliigis produktokvanton de greno de la regiono je 10-30%, 134 milionoj da muoj da herbejoj estas protektataj kaj la produktokvanto de herboj pliigis je 20%.

Kvankam la mediprotekta konstruo en la regiono estas grava konstruo de la ŝtato, tamen la tasko estis plenumita ĉefe de kamparanoj organizitaj de la lokaj registaroj kaj scienc-esploraj departementoj. Tre malgranda estis la investo de la ŝtato, tial en

nemalmultaj lokoj oni prenis la politikon kulturi forston de ekologia ekonomio dum la konstruado. Dum la reguligo de medio kaj plibonigo de la popola vivo oni certagrade solvis ankaŭ la problemon pri manko de mono por la konstruado. En Xinglong-gubernio de Hebeiprovinco oni plantis pli ol kvin milionojn da kratagarboj, kiuj donis pli ol 1.5 milionojn da kilogramoj da fruktoj jare, kaj post kelkaj jaroj ili donos 10 milionojn da kilogramoj jare. En la regiono Hetian de Xinjiang, ĉirkaŭita de la dezerto Taklimakan, multaj ŝoseoj inter vilaĝoj estas ombritaj de pergoloj. La tieaj kampoj estas protektataj

de arboretoj. Jam efektiviĝis tie la celo, ke ĉiu kamparano havu 1 muon da forsto. La areo de forsto jam konsistigas 20% de la tuta oazo.

Nun en la regiono oni reguligas la strukturon de la forstaj specoj, plimultigas ekonomiajn forstojn kaj la nombro de forstaj multspecaj entreprenoj kreskis de 755 en 1987 al 2 658 kaj la jara profito atingis 120 milionojn da juanoj.

Konstrui la sistemon de la kampoŝirma forstozono estas granda kaj peniga tasko, kiu estos finplenumita de ĉinoj en pluraj generacioj, tamen Ĉinio jam faris antaŭen paŝon sukcesplenan. ■

## Monkolekto por Fondaĵo EPĈ-abono

Pro altiĝo de la kostoj de eldonado kaj sendado de "El Popola Ĉinio" ni reguligas de la pasinta jaro la abonkotizon kiel jene: la jara abono (inkluzive de sendokostoj) por la evoluantaj landoj kaj evoluantaj landoj respektive estas 26,00 kaj 14,40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloraj valutoj ŝanĝeblaj en usonajn dolarojn. Pro tio la plejmulto de niaj legantoj en la orienteŭropaj landoj, la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj la evoluantaj landoj, kiuj havas grandan malfacilon en ekonomio, ne povas plu aboni nian revuon. La reduktiĝo de abonantoj pli altigis la produktokoston de nia revuo kaj devigis nin malpliigi ekde ĉi tiu numero la kolorajn bildojn. Ĉi tie ni petas de niaj legantoj komprene mon kaj pardonon.

Konsiderante ilian fortan

deziron daŭre legi nian revuon, ni decidis establi FONDAĴON EPĈ-ABONO, per kiu ni pagos la abonkotizon por iuj malnovaj legantoj kaj esperantistaj aktivuloj de la supre menciitaj landoj. Ni elprenos parton de la rentumo de Ghiselin-Fondaĵo de "El Popola Ĉinio" kiel bazan monsumon de FONDAĴO EPĈ-ABONO. (Tio tute konformas al la deziro de la belga samideano Charles Ghiselin, kiu testamentis, ke lia heredaĵo al EPĈ estu uzata por disvolvo de Esperanto.) Samtempe ni kore petas, ke esperantistoj de la landoj kun bonaj ekonomiaj kondiĉoj monofere al FONDAĴO EPĈ-ABONO por helpi la nepagipovajn samideanojn. Bonvenas eĉ malgranda sumo. Ni ĉiujare aperigos en nia revuo la nomon kaj ofersumon de ĉiuj donacintoj. Helpemuloj bonvolu sen-

di monon (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) al la konto A/C No. 71411749 je la nomo From People China (El Popola Ĉinio) ĉe Bank of China (Banko de Ĉinio). La adreso de la Banko de Ĉinio estas: Fuchengmennei Dajie, CN-100818 Beijing, Ĉinio. Sendante monon, bonvolu sciigi al ni pri la celo de la oferita mono kun kopio de la banka ĉeko. Oni povas sendi ankaŭ monbiletojn (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) rekte al ni en registrita koverto. La adreso estas: El Popola Ĉinio, P.O. kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio.

Antaŭdankon pro via konsidero kaj monofero al FONDAĴO EPĈ-ABONO!

**La Red.**

# Septaga itinero

## Pekino — Xi'an — Ŝanhajo — Suzhou

de GUAN LI

**L**A urbo Suzhou (Suĝou) fondita en 514 a.K. situas sude de la malsupra parto de Yangzi-rivero. La antikvaj ĝardenoj, la reto da riveroj, la sennombraj pontoj, la brodaĵoj, la silko... ĉiam interesas la vizitantojn. Se vi bonvolus viziti la urbon, ĉi tiu itinero estas konsilinda.

La unuajn tri tagojn vi estos en Pekino kaj la sekvantajn du tagojn en Xi'an. Poste vi flugos al Ŝanhajo kaj de tie trajne veturos al Suzhou.

En Suzhou la plej vaste konataj estas ĝiaj ĝardenoj. Ili plejparte estis privataj domoj de riĉuloj en la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911). Ili ne estas tre grandaj, sed ĉiuj havas sian stilon, dank' al la majstra dispozicio de la konstruaĵoj de la ĝardenoj. Iam en la urbo estis pli ol 200 ĝardenoj, kaj la plej elstaraj ĝardenoj Liuyuan kaj Zhuozheng (Ĝuogeng) ankoraŭ estas bone konservataj.

La ĝardeno Liuyuan estas la plej vizitinda. Ĝi estis konstruita antaŭ 500 jaroj kaj poste rekonstruita. Ĝi estas unu el la kvar plej famaj ĝardenoj de Suzhou. La ĝardeno konsistas el kvar partoj: orienta, okcidenta, meza kaj norda. Meze de la ĝardeno estas lageto ĉirkaŭita de rokaĵoj kaj pavilonoj interkomunikiĝantaj per koridoro. Sur la muroj de la koridoro estas pli ol 300 pecoj da ŝtonoj kun gravuritaj kaligrafia-

ĵoj de famaj eruditoj de diversaj etapoj. La orientaj konstruaĵoj estas tre imponaj ekstere, sed malluksaj interne. Okcidente de la ĝardeno estas rokaĵo, sur kiu kreskas aceroj. En la norda parto de la ĝardeno kreskas persikarboj kaj salikoj. En printempo la persikarboj florantaj similas al krepusko, kaj en somero la salikoj ĝustatempe donas agrablan ombbron.

Ankaŭ Zhuozheng estas unu el la kvar famaj ĝardenoj de la urbo. En la ĝardeno akvaro okupas tri kvinonojn de la areo. Sur la akvaro estas koridoroj, kaj la konstruaĵoj plejparte estis lokitaj apud la akvaro. Basenoj, rokaĵoj kaj arboj racie lokitaj en la mezo de la ĝardeno donas serion da diversaj scenoj. En la ĝardeno sume estas 31 racie interspacigitaj vidindaĵoj.

Yiyuan estas negranda ĝardeno, sed la dispozicio de la vidindaĵoj estas tre delikata. Koridoro tondis la ĝardenon en du partojn. La muroj de la koridoro surhavas aĵurajn mozaikajn fenestrojn. Ĉiu fenestro donos al vi novan bildon. En la ĝardeno staras multaj ŝtonegoj kiel ornamaĵoj.

Nun ni veturu en la naturon. La vidindaĵo Tigro-monto atendas nin. Antaŭ ĉ. 2 500 jaroj estro de Wu-regno estis entombigita sur la monto. Post tri tagoj oni vidis blankan tigron gardanta la tombon, kaj pro tio oni nomis la monton Tigro-monto. Sur la

monto staras pagodo de mil jaroj. Pro malleviĝo de stratumo la pagodo kliniĝis je 15 gradoj. Ĝi estas unu el la simboloj de Suzhou.

La monto altas nur 30 metrojn kaj kovras dekelke da hektaroj da tero. Sed kiam oni venas al la monto, oni ricevas la impreson, ke oni troviĝas sur altega kaj apika monto.

La urbon trafluas la Granda Kanalo, kaj en la urbo fluas tre multaj riveretoj. Apud la riveretoj viciĝas domoj tegmentitaj per grizaj tegoloj. Foje kaj foje oni povos rimarki, ke intersalutas virinoj sin apogantaj sur fenestro de la domoj kaj rudristoj de ŝipetoj en riveretoj. Vi povos ŝipveturi en la Granda Kanalo aŭ riveretoj. Vi povos ankaŭ frandi diversajn manĝaĵojn aŭ amuziĝi per aŭskultado de loka opero.

Brodaĵoj de Suzhou estas tre famaj. Vi havos la ŝancon viziti instituton de brodarto kaj artmetiejojn. Kredeble vi miros pri duflanka brodaĵo. Tia brodaĵo havas tute malsamajn bildojn sur la du flankoj de la sama ŝtofo preskaŭ trasidebla. Faldventumiloj el santalo kaj silko de Suzhou ĝuas renomon kaj aĉeto de ili estas konsilinda.

La klimato de Suzhou estas tre bona kaj ĉiu sezono estas taŭga por vizitado. Cetere inter Ŝanhajo kaj Suzhou servas ĉiutage dekoj da kursoj de trajno, kio multe oportunigos la vojaĝon. ■



# Bona komenco de la kampara infana edukado

**E**N Ĉinio, la infaneduka afero, same kiel la aliaj aferoj, havas grandan diferencon inter la kamparo kaj la urboj. Kiam 5-6-jaraj infanoj en la urboj ricevas regulan antaŭlernoagan edukon en infanĝardeno, la kamparaj ankoraŭ ludas sur kampoj tuttage.



Ankaŭ la kamparaj infanoj bezonas edukon. Por solvi tiun urĝan problemon, antaŭ ĉio estas necese kulturi nombron da porinfanaj instruistoj, kiuj ne nur havas infanedukajn sciojn, sed ankaŭ bone konas la kamparajn cirkonstancojn kaj morojn. Dank' al la helpo de la Fonduso Dermnard Van Leer de Nederlando, la Centra Pedagogia Instituto de Pekino kaj Eduka Komisiono de Hebei-provinco kune fondis en 1987 la unuan Esploran Centron de Kampara

Infaneduka Fonto. Ĝis nun, la centro jam trapasis la provperiodon kaj fariĝis sufiĉe esplorkapabla kaj kulturpova institucio. Ĝia ĉefa tasko estas kulturi kaj trejni kamparajn porinfanajn instruistojn.

La nomita centro troviĝas en malgranda kvieta korto de vilaĝo de Qingxian (Ĉingŝjan)-gubernio de Hebei-provinco. Tie orde viciĝas klasĉambroj kaj loĝdomoj. Nin ĝoje akceptis la direktoro de la centro.

La direktoro konigis, ke la centro varbas kamparajn porinfanajn instruistojn. Post sistema trejnado ili ne nur posedas sciojn pri infana psikologio, sed ankaŭ lertas gvidi infanojn fari utilajn ludojn por ekspluati la infanan intelekton. En la centro troviĝas lernobjektoj de infana psikologio kaj edukado, infana higieno kaj sanigo,

Lernado de danco



kampara infaneduka administrado, infanaj elementaj scioj kaj aliaj. Por trejni ilian praktikan lertecon estas ankaŭ farataj bazaj ekzercoj de muziko, danco, belarto, manlaboro k.a.

Ĝuste dum nia vizito iris lecionoj. Ni eniris unu el la klasĉambroj. Tie sidis pli ol kvindek lernantoj. Plejparto el ili estas kamparaj junulinoj. Sur ĉiu tablo metiĝis koloraj paperpecoj kaj diversaj manlaboraj materialoj. Juna instruisto donis manlaboran lecionon. Post nelonge la lertaj manoj de la junulinoj elfaris delikatajn florkorbojn, lanternojn kaj animalojn.

Aŭdiĝis kantoj el la najbara klasĉambro, kie iris muzika leciono. La ĉambro por dancolecio simila al la trejnejo de ensemblo aŭ teatro. Antaŭ granda spegulo instruisto demonstris bazajn dancmovojn. Por la kamparaj junulinoj, kiuj malofte dancas, tio estas iom malfacila, tamen ili lernas serioze.

La centro laŭeble utiligas kamparajn kondiĉojn por instruado. La direktoro invitis nin al la ekspoziciejo de metiartaĵoj faritaj de lernantoj. Ni surpriziĝis de la versimilaj etaj pavoj, kokoj, katoj kaj strigoj el fragmitoj, tritiktigoj kaj rizpajlo, kiuj tre abundas en la kamparo. Ili faris ankaŭ el semoj azenidon, anasidon, ranidon kaj ranon kaj el lufpulpo versimilan krokodilon. El tio vi povas trovi, kiel riĉan imagon la naturo donas al ili. Se la kamparaj infanoj ricevos la saman edifon kaj kulturon, ili certe estiĝos grandan kreivon.

En leciono de manlaboro



La direktoro tre fieras pri la sukcesoj. Li rakontis, ke en la pasintaj jaroj jam funkciis 12 longtempaj kaj 24 mallongtempaj kursoj, en kiuj lernis pli ol 1 300 lernantoj el 44 gubernioj kaj urboj. Plejparto de ili fariĝis porinfanaj instruistoj en gubernioj kaj vilaĝoj kaj kelkaj eĉ establis privatan infanĝardenon. Hodiaŭ 90% de la 5-6-jaraj infanoj en tiuj lokoj ricevas antaŭlernoagan edukon. Delegitoj de la supre menciita Fonduso de Nederlando kaj UNESKO kelkfoje vizitis la centron kaj ege kontentiĝis pri ĝiaj sukcesoj. Ili opinias, ke la centro akiris neatenditajn atingojn en kulturado de instruistoj kaj en esplorado de sperto pri la kampara infana eduko.

La centro havas elstarajn instruistojn, kiuj kumulas kelkajn taskojn. En la morta sezono de kamplaboroj ili instruas en aliaj vilaĝoj kaj tenas regulan kontakton kun la diplomitoj. Du universitataj diplomitoj petis labori en la centro. Nun ili jam estas samideala geedza paro kaj elitaj instruistoj de la centro.

Nun, la videobendo pri la esploraj temoj de la centro estas vendata tra la tuta Ĉinio. La centro estas ofte vizitata ankaŭ de delegitoj el multaj provincoj kaj urboj. Estas aparte menciinde, ke la konceptoj de la kamparanoj ŝanĝiĝas, kiam ili fariĝas pli kaj pli riĉaj. Ili ĉiuj esperas, ke la posteuloj superos siajn gepatrojn kaj fariĝos homoj bonedukitaj kaj promesplenaj. Sekve, ĉiuj kamparanoj subtenas la infanedukan aferon. ■

(Daŭrigo de p. 15)

la aŭto kuras rapide. Sed la superflua vitala esenco ĉiam tralikiĝas. Ekzercante vin per tiu speco de ĉigong-o, vi povas turni vitalan esencon en energion, kiu stimulas la cerbon. Ĝi estas ne nur saniga, sed ankaŭ efika por kuraci polucion kaj tro fruan seksardon.

Faru la ekzercadon antaŭ kaj post dormo en la lito, kurbigu vin, fermu la okulojn, ŝtopu la oretruojn per la montraj fingroj. Fermu la buŝon kaj spiru nature per la nazo (Bildo 10). Elspirante per la nazo, vi povas senti unu aŭ du fojojn, ke la energio rekte atingas la plandojn. Faru tion 5-10 minutojn kaj vi sentos, ke la spermaj duktoj kaj ureteroj iom kuntiriĝas. Post tio vi povas ĉesigi la ekzercadon. Remetu la manojn kaj vin kurbiginte endormiĝu surflanke de la korpo. ■

LU XUN:

# Ĉinaj ideogramoj kaj komputoro

— Pri la Novteknika Kompanio de la Pekina Universitato

**E**N la jaro 1048 Bi Sheng de Ĉinio inventis tipografion. Tio malfermis brilan paĝon en la monda historio de presarto, kaj la tipografio kaj la aliaj tri gravaj inventoj de Ĉinio en la antikveco multe glorigis la posteulojn de la ĉina nacio.

En la 40-aj jaroj de la 20-a jarcento la presarto de la mondo kunfandiĝis kun avangardaj teknikoj de mekaniko, elektroniko kaj optiko kaj redaktoroj povis rekte komposti pere de komputoro. La vasta aplikado de komputoro en la okcidentaj landoj rapide puŝis la homan socion en la epokon de informoj. Tio multe defiis la ĉinajn ideogramojn. La ĉina skribolingvo havas pli ol 60 000 ideogramojn, kaj pli ol 3 000 el ili estas ofte uzataj. Kia malfacilo estis enmeti tiom da ideogramoj en komputoron kaj fari per ĝi kompostadon!

La malfacilon venkis profesoro Wang Xuan (Ŭang Ŝjüan), direktoro de la Komputorika Instituto de la Pekina Universitato, kaj liaj kolegoj. Ili kreis la laseran fotokompostan sistemon Fangzheng (Fangĝeng) kaj tiel malfermis novan eraon por la tipografio de ĉinaj ideogramoj. Tiu atingo vekis admiron de mondaj fakuloj, kaj profesoro Wang estis honorita kiel pioniro de la ĉinlingva fotokompostado kaj Bi Sheng de la nuntempa Ĉinio.

## SPUROJ DE LA SUKCESINTO

Jam antaŭ 20 jaroj profesoro Wang interesiĝis pri enmeto de ĉinaj ideogramoj en komputoron. Li opiniis, ke multe rapidiĝos kompostado kaj presado de libroj kaj gazetoj en la ĉina lingvo, se oni efektivigos senpaperan redaktadon kaj fotokompostadon pere de komputoro. Post foj-refoja konsiderado

li decidis esplori laserfotokompostan maŝinon de la kvara generacio, la plej avangardan kaj ĵus aperintan en la mondo.

Sed la afero iris ne glate. Iuj maltrankviliĝis pro lia malforteco, aliaj dubis aŭ eĉ mokis lin. Nur lia edzino subtenis lin. Ŝi faris projekton kaj provon de softvaroj. Ili penadis 20 jarojn. Sciencistoj sukcesintaj estas respektataj kaj enviataj, tamen ilia penado estas ege granda. Profesoro Wang diris: "Se oni decidos sin dediĉi al scienco, oni perdos la rajton ĝui la vivon de ordinara homo." "Mi forlasis multajn ŝatatajn distraĵojn, kaj kiel rekompencon mi rikoltis ĝojon de sukceso, kiun ordinaraĵoj ne povas akiri."

Somere de 1980 profesoro Wang sukcesis eldoni sian unuan ĉinlingvan libron pere de tiu lasera fotokomposta sistemo, kvankam ĝi nombras nur 26 paĝojn. Wang

Prof. Wang Xuan (meze) kaj liaj lernantoj



La kompanio trejnas junulojn.





Xuan kaj liaj kolegoj fine sukcesis akomodati la ĉinajn ideogramojn al la lasera fotokomposta sistemo. Ĝi estas la lasera fotokomposta sistemo Fangzheng de la Pekina Universitato.

## NOVTEKNIKA KOMPANIO DE TRI JUNULOJ

Samtempe kun la sukceso de profesoro Wang, tri junuloj de la Pekina Universitato fondis la Novteknikan Kompanion sub la universitato.

Instruisto Zhang Yufeng (Ĝang Jufeng) de la Fizika Fakultato de la Pekina Universitato akiris kelkajn sukcesojn en esplorado kaj estis honorita de la Ŝtata Scienc-Teknika Komisiono per la unuagrada premio de scienc-teknika progreso. Sed li kategorie forlasis la fizikan laboratorion kaj fondis teknikan servon per prunteprenita mono kaj post duonjaro la servo akiris profiton. Post unu jaro la servo ekhavis kapitalon sufiĉan por la komenciĝo de la sistemo Fangzheng.

S-ro Yan Maoxun (Jan Maŭŝjun), kolego de Zhang Yufeng, estis faranta fruktdonan sciencan esploron en la laboratorio post studo en Britio. Sed pro la ripetada peto kaj instigo de Zhang Yufeng, Yan adiaŭis sian laboratorion, eniris en la altteknikan industrion kaj fariĝis direktoro de la negoca fako de la ĵus fondita Novteknika Kompanio de la Pekina

Universitato.

Juna s-ro Song Zaisheng, ĵus engaĝita kiel vicprofesoro de la Komputorika Instituto de la Pekina Universitato, estis rigardata kiel promesplena talentulo. Sed ekster la atendo, li fariĝis ĉefingenero de la kompanio.

La tri junuloj havas la saman ideon turni la scienc-teknikajn fruktojn de la scienc-esploraj laborantoj al la granda afero, kiu donos profiton kaj servos al la socio. Dank' al ilia penado la ĵus fondita Novteknika Kompanio de la Pekina Universitato kaj ĝia fotokomposta sistemo Fangzheng komencis sian grandan historian antaŭenmarŝon.

## GRANDA DEBITO EN KAJ EKSTER ĈINIO

En oktobro 1988, kiam la Novteknika Kompanio de la Pekina Universitato estis proponanta sian Fangzheng-sistemon, samspeculo — Huaguang-sistemo de Ĉinio — estis aplikata jam de multaj grandaj ĵurnalaj redakcioj. Iu usona kompanio jam vendis sian laseran fotokompostan sistemon de ĉinaj ideogramoj al la plej granda ĉina ĵurnala redakcio, kaj iu japana kompanio estis konkerinta multajn eldonejojn kaj presejojn per sia fotokomposta sistemo. La cirkonstancoj estis malfavoraj al Fangzheng-sistemo. En tia situacio la kompanio de la Pekina Universitato alprenis la strategion oferti sian sistemon al la ĵurnalaj redakcioj de provincoj kaj grandaj urboj. Fine la kompanion rekompencis multaj kontraktoj pri mendo de ĝia sistemo.

En tiu tempo japanaj elektraj aparatoj "National", germanaj aŭtoj Mercedes-Benz kaj usonaj komputoroj IBM pogrande ŝutiĝis en Ĉinion. Ili estis rigardataj de ĉinoj kiel signo de modernigo. Sed en la kampo de lasera fotokompostado de ĉinaj ideogramoj multaj fremdlandaj kompanioj falis en malfacilon kaj eĉ en komplikojn. Male, Fangzheng-sistemo de la Pekina Universitato pli kaj pli prosperiĝis.

Baldaŭ pli ol du trionoj de la ĵurnalaj redakcioj de Ĉinio aplikis Fangzheng-sistemon.

Ekde 1989 la sistemo estis vendita eksterlande. Oni venis de Hongkong, Aŭmen kaj Malajzio por mendi la sistemon. Nun 14 ĉinlingvaj ĵurnaloj eksterlandaj aplikis Fangzheng-sistemon kaj dekelke da aliaj ĵurnalaj redakcioj jam subskribis kontrakton pri mendo.

## GRANDA PROFITO DE ALTA TEKNIKO

Unu el la gravaj kaŭzoj, kial Fangzheng-sistemo de la Pekina Universitato havis tiel grandan debiton, kuŝas en tio, ke la kompanio posedas internacie avangardan teknikon.


Unue, la sistemo de Wang estas unika en la tekniko por ĉinlingvaj ĵurnaloj, kaj precipe ĝia kolora komposta sistemo estas nekompareble supera kaj monopoligas la merkaton.

La telefaksa sistemo de longdistanca komunikado estas alia kreaĵo de la kompanio. Ĝi ŝanĝis la linian telefakson eksterlande kaj starigis telefakson programitan per komputoro, kiu estas 25-oble pli rapid-mova ol ordinara telefaksa maŝino, kaj ĝia prezo estas multe malpli alta ol tiu de la samspecaj.

La oficeja komposta sistemo 920A kaj la sistemo 93 entenas specialan kradon por figurotraktado, kiun iuj fakuloj opinias plej avangarda en la elektronika eldonado en la pasintaj 18 jaroj.

La kompanio faris utilan provadon kaj akiris bonajn sukcesojn kaj profitojn por ŝanĝi la malnovan administran sistemon de Ĉinio kaj turni novan altan teknikon en produktopovon. En la pasintaj kelkaj jaroj la kompanio vendis pli ol 7 000 kompletojn da laseraj fotokompostaj komputoroj kaj la vendovaloron en 1992 estis 380 milionoj da juanoj.

Nun la kompanio skizas tute novan planon rebriligi la ĉinan nacion kun historio de 5 000 jaroj en la moderna mondo armita per komputoroj. ■



# Alilandaj studentoj en Ĉinio

Fotoj de LI CHUNGENG

En la pensio de Sichuan-universitato de Ĉinio loĝas pli ol 80 studentoj el dekoj da landoj. Tie ili lernas la ĉinan lingvon, ekonomikon, medicinon k.a. Ili estas amikaj al ĉinaj instruistoj kaj studentoj. Post la lecionoj ĉinaj kaj alilandaj studentoj interŝanĝas opiniojn pri lernado kaj rakontas pri moroj kaj kutimoj de sia propra lando. En libertempo alilandaj studentoj aĉetas legomojn kaj preparas bongustajn pladojn en gusto de sia nacio.

Studentinoj el malsamaj landoj




Alilandaj studentoj





Germana studento (dekstre) lernas ĉin-medicinan kuracadon.

Alilandaj studentoj aĉetas legomojn.



Li preparas ĉinan pladon.





# Por la scienc-teknika progreso de la disvolviĝantaj landoj

**N**UN, kiam en la tuta mondo prosperas altaj teknikoj, iuj disvolviĝantaj landoj energie disvolvas sciencojn kaj teknikojn surbaze de la konkretaj kondiĉoj por akceli la ekonomian konstruadon kaj levi la popolan vivnivelon.

Iuj ekonomie progresaj landoj perfektigas sian planon pri sciencoj kaj teknikoj kaj pliigas sian elspezon por ilia disvolviĝo. Por disvolvi sciencojn kaj teknikojn en 1991-1995 la brazila registaro ellaboris planon celantan levi la nivelon de altaj teknikoj, disvolvi altteknikajn industriojn per alilandaj kapitaloj kaj doni teknikan garantion por turni la ekonomian strukturon de Brazilo de importo-anstataŭo al kompleta pordomalfermo. Por tio la brazila registaro levis scienc-teknikan budĝeton de 1.844 miliardoj da usonaj dolaroj en 1991 al 5.156 miliardoj da usonaj dolaroj en 1995. La hinda registaro ellaboris la Okan Kvinjaran Planon por scienc-teknika disvolviĝo, alte taksante la neceson disvolvi teknikojn, senpere utilajn al la socio, kaj alpreni rimedojn konformigi la landon al la bezonado de la informa epoko. Egiptio konstruos sciencan urbon kun la nomo de prezidanto Hosni Mubarak, kiu kovros ĉ. 133 hektarojn da tero. En ĝi funkcios ok institutoj kaj unu internacia trejna centro. Tio estos tre utila al la disvolviĝo de sciencoj kaj teknikoj strikte rilataj kun nacia ekonomio kaj popola vivo.

Por la disvolviĝantaj landoj estas tre gravaj la ŝanĝigo de produktaja strukturo kaj ekspluato de produktaĵoj kun alta aldona valoro. Ekde la 80-aj jaroj, por la disvolviĝantaj landoj ne plu ekzistas la avantaĝo eksporti agrikulturajn produktaĵojn kaj krudajn materialojn. Por ili estas neeviteblaj la ŝanĝigo de produktaja strukturo kaj plialtigo de produktaja kvalito konforme al la akriĝo de la merkata konkurenco. En tiu kampo sudorienta Azio akiris plej bonan efikon. Ekde 1977 Tajlando faras investon ĉefe por la entreprenoj de eksportaj varoj. De post 1984 ĝi kuraĝigas investadon al la petrol-kemiaj entreprenoj, prilaboro de agrikulturaj produktaĵoj, kaŭĉukaj, elektronaj kaj elektro-aparataj fabrikoj k.a. En tiuj industrioj estas atingita granda sukceso. La industriaj varoj nun konsistigas 68.6% de la eksportaj varoj, sed antaŭ 30 jaroj nur 4%. Ekde la 80-aj jaroj Malajzio kuraĝigas eksterlandanojn por investado al la elektro-aparata, elektronika, tekstila, kaŭĉuka kaj plasta industrioj. Sole en 1991 ĝia valoro de eksportitaj duonkonduktantoj atingis 7.06 miliardojn da usonaj dolaroj. Nun en Tajlando kaj Malajzio la produktovaloru de industrio jam superis tiun de agrikulturo kaj en la ekstera komerco la antaŭa multe superis la lastan. La pokapa nacia produktovaloru de la du landoj atingis 1 500 kaj 2 500 usonajn dolarojn respektive. Kaj per tio ili forigis sian malriĉecon.

Por la disvolviĝantaj landoj ekspluati agrikulturon, forstokul-



Legomoj kulturataj en Dalian per alta tekniko

turon, brutobredadon, akcesoran okupon kaj fiŝadon per altaj teknikoj estas ankoraŭ grave. En tiuj landoj la loĝantoj estas en granda nombro, agrikulturo kaj brutobredado okupas tre gravan lokon. Aldonante la eksteran genon al planto, ĉinaj kaj aŭstraliaj agronomoj faris 5-generacian selektadon kaj en 1992 elkulturis novan varion de tritiko, kiu kapablas rezisti kontraŭ naneco, la plej serioza malsano de tritiko. La Hinda Agronomia Instituto elkulturis novan kserofitan rizon, kiu maturiĝas 65 tagojn post semado. Egiptio estas lando fama pro kulturado de longlanuga kotono. Kompreneble, ĝi alte taksas kulturadon de novaj varioj de kotono kaj krome ĝi uzas ankaŭ novan altproduktan teknikon. La agronomoj lernigas al la terkulturistoj la novan teknikon, kaj dank' al tio Egiptio tenis sian pozicion en la internacia kotona merkato dum longa tempo. En Afriko oni kombinas terkulturon kun brutobredado kaj forstokulturo, kio utilas kaj al la agrikultura produktado kaj al la malhelpo de grunda erozio, tiel ke la ekologia medio estos tenata en bona stato. ■

# Akupunkturado al poloj

**I**NVITITE de la prepara komitato de la Orienta Kultura Instituto de Pollando kaj la organiza komitato de la Orienta Medicina Centro de Lodz, mi vizitis Pollandon aŭguste de 1992 kaj helpis preparadon por fondi la instituton. Tie mi laboris pli ol 3 monatojn kaj la vizito postlasis al mi neforgeseblan impreson.

La preparado de la Orienta Kultura Instituto estis subtenata de la Universala Esperanto-Asocio kaj koncernaj eŭropaj, aziaj kaj amerikaj organizaĵoj kaj individuoj. La prezidanto de la prepara komitato estas prof. Liang Ziming (ĉino) kaj vicprezidanto estas d-ro Tadeusz Ejsmont (polo). La instituto estis oficiale sankciita de la Ministerio de Alta Eduko de Pollando septembre de 1991, kaj ĝia laboro estas metita en la tagordon de la ministerio. Ĝi estas

unika supera lernejo destinita por studi kaj disvastigi la orientan kulturon.

En la instituto funkcias la fakultatoj lingva, medicina kaj uŝu-ĉigong-a, kaj ankaŭ la fakultato de internacia ekonomia komerco kaj tiu de administrado de hoteloj. Akupunkturo, masaĝo, ĉigong-o, uŝu-o kaj aliaj fakoj de la fakultatoj uŝu-ĉigong-a kaj medicina havas striktan rilaton kun la instruado pri kaj kuracado per la ĉina medicino. Koncerne tion, ni laboris por funkciigi la supre menciitajn fakojn kaj donis helpon al la instruado kaj kuracado en la instituto.

Samtempe kun tio, ni helpis niajn kolegojn funkciigi akupunkturajn klinikon en Lodz, la dua granda urbo de Pollando. Per malgranda pinglo ni kuracis polajn malsanulojn. Nia akupunkturado estis varme bonvenigata de poloj. Iuj el ili prenis

medikamenton dum longa tempo, sed iliaj malsanoj ankoraŭ ne mildiĝis. Post plurfoja akupunkturado ili tute resaniĝis. Iu balelisto vundis al si la talion kaj kruron. Li ne povis prezenti dum 3 semajnoj, kvankam li plurfoje konsultis lokan hospitalon. Ni akupunkturis lin 5-foje, la doloro forlasis lin kaj li denove sursceniĝis. Por esprimi sian dankon li invitis nin spektilian prezentadon. Inter niaj pacientoj estis maljunuloj kaj infanetoj. Iam okazis, ke tuta familio venis al ni por ricevi akupunkturadon. Dank' al la diskonigo far la pacientoj, la ĉina akupunkturo multe diskoniĝis en la urbo. Kiam oni informiĝis, ke ni baldaŭ revenos Ĉinion, ili skribis kelkajn vortojn por esprimi sian dankon kaj bondezirojn al ni. Ili deziris, ke ni revizitu Pollandon kaj kuracu ilin per la tradicia ĉina akupunkturo.

Dum la restado ni vizitis la Polan Ŝtatan Hospitalon kaj privatan klinikon kaj faris intiman interparolon kun niaj polaj kolegoj. Ili multe interesiĝis pri la tradicia ĉina akupunkturo kaj deziris, ke oni entreprenu akupunkturadon kiel eble plej frue en Pollando, helpate de ĉinaj kuracistoj. Krome, ni vizitis ankaŭ universitaton, muzeon kaj teatron kaj gastis ĉe inĝenieroj, instruistoj kaj laboristoj. Ilia varma akcepto montris la amikecon de la pola popolo al la ĉina.

Zhang Anli (la dua de maldekstre) kuracas polajn pacientojn.



La aŭtoro estas vicprofesoro de la Jiangxi (Ĝjangŝji)-a Ĉin-medicina Instituto de Ĉinio.

### EKONOMIO

● Por garantii glatan iradon de la konstruado de la Trigorĝa Projekto de Yangzi-rivero, la ĉina registaro decidis starigi koncernan komisionon. La komisiono estas la plej supera politik-ellabora organo por la granda projekto. Sub ĝi funkcios la oficejo pri la laboroj de la projekto, ekspluata buroo pri translokado de loĝantoj kaj ĝenerala kompanio pri la konstruado kaj administrado de la projekto.

● La Tria Pekina Internacia Foiro, kiu daŭris 7 tagojn, okazis en la Ĉina Internacia Ekspozicia Centro en la unua tagdeko de aprilo ĉi-jare. La foirejo kovris areon de 40 000 kvadrataj metroj. Ĝin partoprenis entreprenistoj de pli ol 3 000 fabrikoj venintaj el Ĉinio, Aŭstrio, Aŭstralio, Brazilo, Kolombio, Ĉeĥio, Hungario, Usono kaj Birmo, kaj el Hongkong kaj Taiwan-provinco. La fabrikoj apartenis al la kampoj de energio, trafiko, telekomuniko, malpeza industrio, ŝpintekso, aeronautiko, mekaniko, elektroniko, metalurgio, konstruado, kuracado, manĝaĵ-industrio, elektro, agrikulturo, forstumado kaj kemiindustrio.

● La ekspozicio pri atingoj akiritaj de la ĉinaj ĉemaraj malfermitaj urboj en la pasintaj 14 jaroj okazis antaŭ nelonge en Pekino. Per televidfilmo, bildo kaj objekto la ekspozicio konigis la atingojn akiritajn de la 5 specialaj ekonomiaj regionoj kaj 14 ĉemaraj malfermitaj urboj en la ekonomia konstruado, scienc-teknika disvolviĝo kaj popola vivo.

La ĉinaj ĉemaraj malfermitaj urboj kaj la specialaj ekonomiaj regionoj havas cent milionojn da loĝantoj kaj kovras 2% de la areo de la tuta lando. En 1992 ilia nacia produktovaloro atingis 351.8 miliardojn da juanoj (unu usona dolaro = 5.7 juanoj), t.e. 18.1% de tiu de la tuta lando.

● Oficisto de la Ĉina Popola Banko diris, ke post nelonge Ĉinio faros financan reformadon, ke la ĉina mono Renminbi (Ĵenminbi) estu interŝangebla internacie. Tuj kiam malgrandiĝos la procenta diferenco inter la oficiala kaj eksterborsa valoro de la mono, oni nuligos paŝo post paŝo monbileton uzatan de alilandanoj en Ĉinio.

● La 15-a de marto estas la Internacia Tago de Rajtoj kaj Intereso por Konsumantoj. La Ĉina Asocio de Konsumantoj kaj koncernaj organizaĵoj kune faris grandan propagandon kaj servadon en Pekino, kun la celo ataki vendadon de falsaj kaj malbonkvalitaj varoj, proponi bonkvalitajn varojn, ordigi la merkatan ekonomion kaj protekti la interesojn de la konsumantoj.

● En Ĉinio sume 40 000 alilandaj fakuloj laboras en la kampoj industria, agrikultura, scienc-teknika kaj eduka. Samtempe kun tio, en 1992 Ĉinio

sendis 30 000 teknikistojn kaj administrantojn al aliaj landoj por ilin trejni.

### KULTURO

La ŝtonkavernaro Dunhuang, antikva arta trezoro, en nordokcidenta Ĉinio, estas unu el la plej grandaj kulturaj heredaĵoj en la mondo. La plej frua ŝtonkaverno en ĝi havas historion de 1 600 jaroj. Pro erozio kaj aliaj kaŭzoj la ekzistantaj 492 kavernoj, 45 000 kvadrataj metroj da freskoj kaj 2 000 koloraj modlaĵoj estas difektitaj pli-malpli. Por eterne protekti la freskojn Dunhuang-instituto kaj aliaj organizaĵoj enmetos informojn pri ili en komputoron.

### SPORTO

● La Supera Gardista Kompanio de Cangzhou (Cangĝoŭ) fondiĝis la 13-an de februaro 1993 en la urbo, "hejmloko de uŝu-o" de Hebei-provinco, Ĉinio. Utiligante sian superecon de uŝu-o, la kompanio trejnas superajn gardistojn por ŝtataj institucioj, enlandaj famuloj kaj eksterlandaj firmaoj kaj konsorcioj. La trejnitaj gardistoj povoscias fremdan lingvon, tajpadon, veturigadon, rajdadon kaj pafadon. Ili povas funkcii samtempe kiel sekretario, aŭtokondukisto kaj gardisto.

### MEDICINO

● La Yali-a Bioingenieria Kompanio de Zhuhai (Ĝuhaj), Guangdong-provinco, sukcese elfaris reakcilon por rapidigi tutsangan diagnozon de aids, kiu povas plenumi ekzamenadon de aids en du minutoj. Nun la reakciilo servas en 22 ĉinaj kvarantenaj burooj kaj stacioj kaj aplikiĝos en la tuta lando. La tekniko estas sankciita de koncerna aŭtoritata instanco de la mondo kaj atentata de la internaciaj medicinistaj ron-

Ĝemelaj pandoj en la Pekina Zoo





doj.

- Profesoro Wu Mengchao, unu el la fondintoj de la hepata kirurgio de Ĉinio, la unua en la mondo operaciis iun pacienton en la meza loko de la hepato en 1963 kaj sukcese faris al li heptan ektomion, kio sensaciis siatempe la medicinistajn rondojn. En la lastaj 30 jaroj profesoro Wu faris pli ol 1 200 hepatajn operaciojn. 98% de la operaciitoj resaniĝis. Li okupas unuajn lokojn en Ĉinio kaj en la mondo kompare kun siaj kolegoj per nombro de operacioj kaj per kvanto de suferantoj vivantaj post operacio.

### SCIENCO KAJ TEKNIKO

- La unua superkondukta unustadia elektromotoro de Ĉinio estas elfarita en Wuhan, Hubei-provinco. Ĝi havas kapaciton de 300 kilovattoj kaj ĝia naskiĝo akcelos la uzadon de superkondukta tekniko en Ĉinio. Similan motoron kun kapacito de pli ol 300 kilovattoj elfaris nur Britio kaj Usono.


### SOCIO

- Je la fino de 1992 Ĉinio havis ĉ. 1.15 miliardojn da loĝantoj (ekskluzive de tiuj de Hongkong, Aŭmen kaj Taiwan), je 0.92% pli multe ol tiuj en 1991. Ekde 1982 la familia skalo malgrandiĝas jaron post jaro.

- La 5-an de aprilo 1993, la registaro de Nanpi-gubernio, Hebei-provinco, okazigis kultan ceremonion por Zhang Zhidong (Ĝang Ĝidong), ministro de Qing-dinastio (1644-1911), kiu entreprenis pezan industrion kaj alte taksis edukadon.

Por glorigi Zhang Zhidong, disvolvi nacian kulturon kaj prosperigi lokan ekonomion, la registaro de la gubernio konstruos ĝardenon por Zhang kun areo de 67 hektaroj en lia tombejo.

Kamparana ĝardeno en Jiangsu



Zhang Zhidong

La ĝardeno estos nova turisma loko de la provinco sur la itinero el la lando de akrobataĵoj kaj naskiĝloko de baji-bokso.

### ARKEOLOGIO

- Naŭtilo, konata kiel viva fosilio de konkulo kaj rara trezoro funde de maro, estis eltrovita en la lastaj jaroj en la Suda Ĉina Maro. Antaŭ miloj da jaroj multaj specioj da naŭtiloj vivis en la vasta maro. Post la ŝanĝiĝo de la marfundo nur kelkaj specioj da naŭtiloj vivas en Taiwan-markolo de Ĉinio, la Suda Ĉina Maro, la Malaja Insularo kaj varmaj maroj de sudokcidenta Pacifiko. Nun naŭtiloj vidiĝas nur en akvarioj de tre malmultaj landoj kia Usono.

### TURISMO

- Iu pli-ol-60-jara germanino trairis en radseĝo la dezerton Taklimakan de Xinjiang (Ŝingjang), la duan grandan moviĝantan dezerton en la mondo kaj nomatan Maro de Morto. En Xinjiang specialaj vojaĝoj, kia dezerta ekspediciado, altiras pli kaj pli multajn alilandajn turistojn. En la lastaj jaroj pli ol 10 000 alilandaj turistoj partoprenis tian vojaĝon.

- En la vasta kamparo de Jiangsu-provinco konstruiĝis pli ol 1 000 ĝardenoj por kamparanoj. Tie ili povas ripozi, trinki teon aŭ ĝui muzikon. Ĉ. miliono da urbanoj kaj alilandaj turistoj vizitis la ĝardenojn.

ZHANG QINGZHEN:

# Neordinara boks- konkurso

**P**REZIDANTOJ de la tri mondaj profesiaj boksistaj organizaĵoj, la Internacia Boksista Federacio, la Monda Boksista Organizo kaj la Nacia Boksista Asocio de Usono, gvidante siajn eminentajn boksistojn, veturis al Pekino por partopreni la ĉampionecan konkurson en la sama konkursejo kaj sama tempo. Tio ne okazis eĉ en tiuj

landoj, kie furoris boksado. 20 000 rigardantoj de Pekino havis la ŝancon rigardi la konkurson pri mondaj ĉampionecoj en la komenco de la kuranta jaro.

La 27-an de februaro internaciaj profesiaj boksistoj faris tri ĉampionecajn kaj du prezentajn boks-matĉojn. La tri orzonoj ĉiu havas sian mastron.

Estis neordinare por la ĉinaj rigardantoj, ke ili havis la ŝancon propraokule rigardi la maloftajn internaciajn boks-matĉojn en sia lando. Pro tio multaj el ili estis ege ekscititaj.

En la konkurso la plej altira estis la altnivela kaj intensa matĉo inter la monda ĉampiono de malpeza kategorio de MBO Leeonzer Barber kaj la defianto Mike Sedillo. Kiel profesia boksisto, 26-jara Barber, 197 cm alta, kaj 81 kg peza, partoprenis 17 boks-matĉojn, el kiuj li gajnis 16 kaj perdis nur unu. Li diris: "Mi opinias, ke mi ne plenumas mian taskon, se la rivalo ankoraŭ staras tie post kelkaj raŭndoj." La 33-jara Sedillo, 191 cm alta kaj 80 kg peza, partoprenis 33 matĉojn, el kiuj li gajnis 24, perdis 7, kaj la aliaj du matĉoj paciĝis. Li diris: "Mi estas la plej elstara boksisto en la boksa rondo. Mi povas venki ĉiujn rivalojn, inkl. de monda ĉampiono."

Je la komenco de la konkurso, agento, alte tenante orzonon de malpez-peza kategorio de MBO, kondukis la du boksistojn al la konkursejo. Eksplozive aplaŭdoj. La spertoplena prezidanto de la internacia profesia boksado anoncis: "Tio estas la plej grava

ZHANG QINGZHEN:

# Surglacia konkurso

**M**ARTON okazis en Pekino la Monda Mallongkureja Sketkura Ĉampioneca Konkurso de 1993. Ĝin partoprenis teamoj el 24 landoj kaj rigardis pli ol dekmil spektantoj.

La sportistoj el Kanado, lulilo de la mallongkureja sketkuro, gajnis la viran kaj virinan ĉampionecojn de 1 500 m. Tio montris ilian grandan forton en tiu flanko.

La angla sportisto Willy O' Reilly novigis la mondan rekordon 2'22"71 per 2'22"67 en la vira 1 500-metra antaŭfinala matĉo.

La ĉinaj sportistinoj Zhang Yanmei (Ĝang Janmej) kaj Wang Xiulan (Ŭang Ŝiulan) rompis mondajn rekordojn en la virina 500-metra matĉo. En la virina 3 000-metra duonfinala stafetmatĉo la ĉina teamo per 4'28"63 rompis la mondan rekordon 4'33"49, kiun kreis la antaŭa ĉina teamo.



matĉo ĉi-vespere.”


En bruado de tamburino komenciĝis la konkurso. Barber intencis unue reteni la rivalon kaj atendi la ŝancon por ataki lin, dum Sedillo forte atakis la kontraŭulon, foje kaj foje minacis lin per svingoj. La paŝoj de Barber estis facilaj kaj la movoj belaj, dum la batoj de Sedillo estis fortaj. La luktado estis tre intensa. Ili batalis 12 raŭndojn. Fine Barber knokaŭtis Sedillon. En aplaŭdado kaj huraado de la rigardantaro Barber denove zonis sin per orzono de malpez-peza kategorio de MBO.

La Pekina Internacia Profesia Ĉampioneca Boksado faris sansacion. Ĝi ne nur plenis la blankon en la ĉina boksa historio, sed ankaŭ rompis la katenon de la ĉina tradicia koncepto kaj aperigis profesiajn boksistojn en la ĉina sportejo.

La konkurso altiris al si multajn ĵurnalistojn en-kaj eksterlandajn, alilandajn rigardantojn kaj respondeculojn de la mondaj boksistaj organizaĵoj. Laŭ raporto, centoj da milionoj da rigardantoj de Usono, Eŭropo kaj Azio televidis la boksadon.

Oni povas diri, ke la organizanto de la konkurso s-ro Li Wei, prezidanto de la Ĉina Xinghua-a Grupo, faris bonan aferon. Li jam fariĝis la unua agento de la profesia boksado en Ĉinio. Ĉar okazis la unua boksado en Ĉinio, do proksimiĝos la tago, en kiu okazos monda boksoreĝa konkurso.

Menciindas, ke la respondeculoj de la tri mondaj



Bert Cooper (dekstre) kaj Mike Weaver en konkurso de peza kategorio

boksistaj organizaĵoj kaj la boksa reĝo Ali ĉiuj alte taksis la pekinajn rigardantojn kaj dankis ilin pro ilia subteno al la profesia boksado. Prezidanto de IBF Robert W. Lee diris: “Tio estas historia konkurso. Okazigo de la konkurso por profesiaj boksistoj en Ĉinio havas eksterordinaran signifon por Pekino, kiu petas gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2000.” ■





# Novaj fruktoj por homa sano

de ZHOU XIAOQING kaj LIAO XUNBAI

**J**AM de longe la ĉinoj uzas drogherbojn por kuraco kaj sanprotekto. En la naturo kreskas multaj herboj, kiuj montris sian mirindan efikon en kuraco de homaj malsanoj. Unu el ili estas kordicepo (*Cordyceps sinensis*), kiu estas efika por protekto de la pulmoj kaj renoj, kaj pliigo de la vitala energio. Kordicepo, ginsengo kaj juna cervokorno estas rigardataj kiel tri valoraj tonikaj drogoj de Ĉinio.

Pro malmulteco kaj multekosteco, la sovaĝa kordicepo estas malofte uzata en kuracado. En 1972 la Farmacia Instituto de la Ĉina Medicina Akademio komencis sintezan esploradon pri kordicepo. Per modernaj sciencoj kaj tekniko oni malkombinis ĝin kaj trovis kordicepofungon. Poste oni fermentigis ĝin kaj elkulturis kuracan kordicepofungon.

En 1982 la instituto, kunlabore kun la Jiangxi-a Ĉin-medicina Fabriko, ricevis per profunda fermentigo kordicepofungan medikamenton, kiun oni nomas Jinshuibao.

Pli ol 200 fakuloj el la Farmacia Instituto de la Ĉina Medicina Akademio kaj 30 superaj lernejoj, scienc-esploraj institutoj kaj medicinistaj rondoj faris analizon kaj zorgeman studon pri Jinshuibao. Oni konstatis, ke la kemia konsisto de Jinshuibao tre similas al tiu de la natura kordicepo kaj la farmakologiaj efikoj de ili ambaŭ estas sendiferencaj, sed la en ĝi entenataj 19 aminoacidoj, vitamino E kaj mikroelementoj zinko, kalio, mangano, fosforo, seleno, kupro, magnezio kaj kalcio estas pli multaj ol tiuj en la natura kordicepo.

S-roj Chen Keji kaj Tian Lin, fakuloj de la kontraŭsenila medicino de Ĉinio, opiniis, ke gemaljunuloj plejparte suferas de febliĝo de pulmoj kaj renoj. Por ili Jinshuibao estas ideala medikamento sanprotekta kaj kontraŭsenila. Se oni prenas ĝin konstante dum longa tempo, oni vivos pli sane kaj pli longe. Alia fakulo Tao Zhonghua konfirmis, ke per la kapsulo Jinshuibao oni kuracis multajn virojn, kiuj suferis de malafrodizio, kaj ricevis ĝojigan efikon. La klinika praktiko certigis, ke Jinshuibao estas efika ankaŭ en prevento kaj kuraco de tumoroj kaj hepata cirozo kaŭzita de skistosomozo.

Ĉinaj medicinistoj kaj malsanuloj alte taksas Jinshuibao. Pluraj gazetoj kaj radiostacioj raportis pri ĝia bona efiko.

En 1988-1991 Jinshuibao ricevis kupran medalon en la Pekina Internacia Inventaja Ekspozicio, oran pokalon en la Unua Ĉina Juĝkunveno de la Kontraŭsenilaj Medicinaĵoj. Por kontentigi la bezonon de la en- kaj eksterlanda merkato, en 1992 fondiĝis Farmacia Kompanio (Limigita) de Jinshuibao investita de la Jiangxi-a Ĉin-medicina Fabriko kaj eksterlandanoj kune. La kompanio rigardas Jinshuibao kiel komunan riĉaĵon de la tuta mondo kaj deziras starigi pere de la Internacia Lingvo amikecan kunlaboron kun la tutmondaj esperantistaj organizoj, ĉiuj samideanoj de la medicinistaj, ekonomiaj kaj komercistaj rondoj, por ke Jinshuibao portu feliĉon al la tuta homaro. ■

La medikamento estas bonodora helbruna pulvoro, farita el kordicepofungo kaj paci-lomicoj (*Paecilomyces hepiali* Chen) Cs-4 ricevitaj en malkombino de freŝaj kordicepoj «*Cordyceps sinensis* (Berk) Sacc» de Qinghai-provinco, Ĉinio, post rafinado, fermentado kaj prilaboro.

## INGREDIENTOJ:

La medikamento entenas nukleozidojn, kiaj adenozino, uridino, manitelo, ergosterolo; 19 aminoacidojn, kiaj asparaga acido, glutamino, trionino (angle: *threonine*), glicineo, lisino, serino, alanino, leŭcino kaj plorino; mikroelementojn, kiaj zinko, kalio, mangano, fosforo kaj seleno; kaj vitaminojn B1, B2, E k.a.

## FUNKCIOJ:

Ĝi, utila por la renoj kaj pulmoj, estas efika por kuraci kronikan bronkiton (longdaŭra tusado sen mukaĵo, aŭ kun mukaĵo viskoza kaj blanka, malsaneca ŝvitado en dormo), hiperlipemion (laciĝemo, kapturniĝo, nesensiviĝo de la membroj, sufokiĝo, korpulenteco kaj mukaĵ-sputemo), heptan cirozon kaŭzitan de skistosomozo, impotentecan, tro fruan spermatoreon, malafrodizion, maljunulan lumbalgion, malvarmiĝemon, zumadon en la oreloj, sendormecon, malboniĝon de la memoro kaj malfirmecon de la dentoj.

## EFIKOJ:

Ĝi estas efika kontraŭ inflamo, tusado, utila al gonado, malpliigo de kolesterolemio, triglicerido kaj lipidaj peroksidoj, faciligo de la sangcirkulado al la koro kaj cerbo, hipotensiiĝo, malhelpo de koaguliĝo de trombocito, plilongigo de la animala vivo, kiam al tiu mankas oksigeno, protekto de la cerbo kaj koro. Ĝiaj farmakologiaj efikoj estas similaj al tiuj de

# KAPSULO JINSHUIBAO

La kapsulo Jinshuibao (Ĝinŝujbaŭ) produktata kun sankcio de la Higiena Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko



## Ĝi ricevis jenajn premiojn:

- Kupra medalo en la Pekina Internacia Inventaja Ekspozicio;
- Ora pokalo en la Unua Juĝkunveno por Kontraŭsenilaj Medicinaĵoj;
- Duaklasa premio por scienc-teknika progreso donita de la Ŝtata Ĉin-medicina Administracio;
- Ŝtatnivela triaklasa premio por scienc-teknikaj fruktoj.



la naturaj kordicepoj de Qinghai-provinco.

Oni prenis la medikamenton por kuracado kaj ricevis evidentan efikon. Krome, ĝi estas sekura, sen malutila reakcio.

Prenu trifoje ĉiutage po 3 kapsulojn post

manĝado, aŭ laŭ konsilo de kuracisto.

Ĉiu kapsulo entenas 0.33 g. da fermentinta pulvoro de kordicepofungo.

Konservu ĝin en loko seka kaj malvarmeta.

**Produktantoj: Farmacia Kompanio Jinshuibao  
(Limigita) investita de Ĉinio kaj Eksterlando kune  
Jiangxi-a Ĉin-farmacia Fabriko**





La pitoreskejo Longqingxia en Pekino

Foto de **YAN JIN**

